

Nov-zelando: Jam komenciĝis elektoj



Ja-pan-io kaj butero

**Mankas mono,
mankas sano**

**Militkrimoj:
Desapontas del Ponte**

Floras amikeco

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Kapskuo

Se mi bone aŭskultis la novaĵojn, la turka supera kortumo rifuzis la leĝon deklaritan de la aktuala turka registaro, repermesi la kaptukon en la universitatoj. Ĝi kontraŭis la aturkan laikan ŝtaton. Do, pli turke ol la turkoj mem ni ne devas esti.



10

Floras amikeco

La edzino de la litova prezidanto Valdas Adamkus havas sian propran tulipon. Alma Adamkienė ricevis la tulipon, kreitan de la nederlanda floristo Jan Lichthart [liĥhart], de la nederlanda ambasadorino Anne-mieke Ruigrok [anemike rejĥrok].



15

Mankas mono, mankas sano

En Japanio mortigas sin ĉiujare pli ol 30 000 homoj. En junio 2008 raportis la ŝtata policagentejo, ke en 2007 mortigis sin 938 homoj pli ol en la antaŭa jaro – entute 33093 homoj. Statistike propramane pereas plej ofte 60-69-jaruloj kaj 30-39-jaruloj.



16

Manĝi estos pli koste 20

Dum jardekoj en Eŭropo kaj Usono estis produktataj tro multe da nutraĵoj. Malgraŭ la troo la prezoj ofte estis super la nivelo de la monda merkato, sed ili estis stabilaj kaj ne prenis tro grandan parton de familia buĝeto. Nun la stokegoj malaperis kaj la nutraĵprezoj rapide kreskis je pluraj, en triamondaj landoj eĉ je plurdekaj procentoj.

politiko

REAGO	10
Kapskuo	
MILITO	10
Bomb-ardo senkiala	
NACIIISMO	10
Hejmeniru!	
MILITKRIMOJ	11
Desapontas del Ponte	
NOV-ZELANDO	12
Jam komenciĝis elektoj	
ESEO	13
Unueco kaj diverseco	

moderna vivo

ALBANIO	14
Fero-infero	
Por plori, por ridi	
„Kial mi ne aperas, panjo?“	
NUTRAĴOJ	15
Ja-pan-io kaj butero	
LITOVIO	15
Floras amikeco	
SINMORTIGOJ	16
Mankas mono, mankas sano	
URBOJ	16
Odeso-impreso	
HOMAJ RAJTOJ	17
Krucifikoj	
MANGAĴOJ	18
Ku(kur)bo!	

ekonomio

NUTRAĴOJ: Manĝi estos pli koste	20
ĈINIO: Rafinejo jubileas	22
ASOCIOJ: Asocia kaj volontula laboroj ekonomie gravas ..	23

turismo

FINNLANDO: Lerto admirenda	24
---	----

lingvo

REAGO: Manko de bonaj instruistoj?	25
---	----

scienco

RABIO: Batalo kontraŭ mortiga malsano	26
--	----

spirita vivo

Korano en pinto de plejvenditaĵoj	28
VATIKANO: Papo Pio la 12a – judsavanto	28
KAUNAS: Ekologia preĝejo	29
ISLAMO: Etna danino fariĝas proparolanto por islama kredantaro	29

libroj

Nekutime leginda verko	30
Mezepokaj sekret(igit)aj sonetoj	31

eseo

Punkto de malekvilibro	32
------------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6-8
› El mia vidpunkto	9
› Anoncetoj	35

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			LA JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5
Belgio	EUR	49	58	29,4	5
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5
Britio	GBP	34	37	20,4	4
Bulgario	EUR	25	29	15	5
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5
Danio	DKK	365	395	219	40
Estonio	EUR	25	29	15	5
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5
Francio	EUR	49	53	29,4	5
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5
Grekio	EUR	45	49	27	5
Hispanio	EUR	45	49	27	5
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5
Hungario	EUR	25	29	15	5
Irlando	EUR	49	53	29,4	5
Islando	EUR	49	53	29,4	5
Israelo	EUR	41	45	24,6	5
Italio	EUR	49	53	29,4	5
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860
Kanado	CAD	73	78	43,8	9
Kipro	EUR	33	37	19,8	5
Koreio	EUR	41	45	24,6	5
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5
Kroatio	EUR	25	29	15	5
Latvio	EUR	25	29	15	5
Litovio	EUR	25	29	15	5
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5
Malto	EUR	33	37	19,8	5
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5
Norvegio	NOK	390	430	234	45
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5
Rusio	EUR	23	27	13,8	5
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5
Slovakio	EUR	25	29	15	5
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5
Svedio	SEK	460	495	276	49
Svislando	CHF	82	88	49,2	9
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5
Usono	USD	69	75	41,4	8
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalin.net.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, Tehran.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novi-resp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.

- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburgo:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gd-dewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Dikeco denove



Ĉu vi memoras? Antaŭ unu jaro ĉi-loke mi rezonadis pri dikeco, ĉar tiam oni informis, ke germanoj estas tro dikaj (MONATO 2007/6, p. 5). Tuj pro tio ministro pri nutrado anoncis kampanjon, sed daŭris pli ol unu jaron, ĝis fine li kaj la kolemino, kiu respondas pri sano germana, nun povis prezenti la kampanjon, kiu havas la pompan nomon „Nacia agadplano pri nutrado”. Sciencaj pruvoj, ke dikeco (kiel ja difini ĝin?) estas malsaniga aŭ mallongigas la vivon, estas – magraj, por ne diri senbazaj. Laste novaj studaĵoj eĉ montris, ke homoj, kiuj havas pli ol idealan (laŭ iuj tabeloj) pezon, vivas plej longe kaj malsanas plej malofte. Nutraj-fakuloj fine konfesu publike, ke ili praktike tute ne scias, kiuj nutraĵoj estas sanigaj kaj kiuj ne. Ĉu vegetaranoj, ekzemple, vivas pli sane? Eble, sed ĉu ni ne preskaŭ ĉiusemajne ricevas alarm-informojn, ke denove oni trovis restaĵojn de venenoj en legomoj kaj fruktoj, eĉ en tiuj, kiuj deklaras sin mem ekologie puraj kaj dekoracias sin, almenaŭ en Germanio, per la epiteto „bio”?

Simile pri sporto, kiu ankaŭ estas parto de la supre nomita agadplano. La registaro volas instigi civitanojn pli multe sportu-

mi. Sed laŭ medicina vidpunkto programoj kiel 3000 paŝoj ekstere estas dubindaj, ĉar tion oni devus regule fari, por ke ĝi utilu. Por preventado sporto do taŭgas nur, se oni konstante kaj intense sportumas. Sed eĉ en tiu okazo la vera utilo estas dubinda. Ĉar laŭ statistika aspekto tiu vivas pli longe, kiu sportumas – sed la tiel gajnitan vivodaŭron oni bezonas por la trejnado mem ... Do la tempogajno estas nula! Ne malmultaj sportmedicinistoj pridubas eĉ tion. Ilia ekono estas: Kiu sportumas, ne vivas pli longe, sed mortas pli sana. Kia konsolo!

Politikistoj fine ĉesu trakti nin kiel infane-tojn, kiujn oni edukas per permesoj kaj preskriboj, per malpermesoj kaj avertoj. Kiu volas, tiu rajtas sportumi, kun aŭ sen beno de registaro. Kaj oni lasu nin manĝi trankvile, kion ni ŝatas kaj kio allogas nin. Tio feliĉigas nin kaj estas saniga, kaj tial unu el la malmultaj nutrad-konsiloj, kiujn evidente neniu ĝis nun povis kontesti: bonan apetiton!

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rakto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kovács, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kal-verstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Tibeto jes, Kosovo ne

Se nacio aŭ etno havas propran historion, propran kulturon, propran deziron sendependiĝi, estas malmore kontraŭstari. Tio validas eĉ pli, se la sendependiĝonta nacio estis militite okupita kaj tiel perdis antaŭan libecon. Ni pensu ekzemple pri Tibeto.

Tamen, se regiono komence apartenas kulture kaj historie al difinita lando kaj se poste tiu regiono estas amase ekloĝata de eksterlandanoj, kiuj iom post iom fariĝas plimulto; se imperio apogas la sendependiĝon de tiu regiono disde la cetero de la lando pro klaraj geopolitikaj avantaĝoj; se la sendependiĝo kontraŭas internacie leĝajn interkonsentojn, ĉu tiam la sendependiĝo estas morale akceptebla?

Miaopinie, Kosovo apartenas al la dua klaso. Mi vetas, ke Kosovo aneksiĝos al Albanio sufiĉe baldaŭ, kiel Teksaso aneksiĝis al Usono siatempe.

Juan Jacobo SCHMITTER-SOTO
Meksiko

Irano kaj Vatikano

„Kredo kaj racio estas ambaŭ esence ne perfortaj: nek la unua, nek la dua devus esti uzataj por pravigi perforton.” Tio estas unu el la precipaj akordaj punktoj, esprimataj de la partoprenantoj en la sesa kolokvo inter la Vatikana Konsilio por Interreligia Dialogo kaj la Centro por Interreligia Dialogo de Tehrano.

La renkonto, dum kiu serene, jes, sed laŭ plej altaj pluraspektaj vidanguloj alfrontiĝis la delegitaroj vaticana kaj irana dum tri tagoj, fermiĝis la unuan de majo per komuna aŭdienco ĉe Benedikto la 16a. La temo estis

„Kredo kaj racio: kia interrilato?”, kiu vastiĝis ĝis „Teologio kaj Kalamo (islama teologio) enketantaj pri racieco de la kredo” kaj „Kredo kaj racio antaŭ la fenomeno de per-forto”.

La sep oficialaj delegitoj de ĉiu flanko kune komentis la konkludajn tezojn en la vaticana gazetara salono antaŭ plurcentoj da ĵurnalistoj kaj respondis diversspecajn demandojn pri la fina anonco „Perforto estas ĉiam kontraŭdia”.

La konferenco estis gvidata de altnivelaj respondeculoj de ambaŭ flankoj kaj okazis kadre de konsultadoj inter katolikismo kaj ŝijaista islamo. La venonta kolokvo okazos en Tehrano.

Armando ZECCHIN
Italio

Ĉu bojkoto? (12)

Klaras, ke ekzistas ne nur oportunismo, sed ankaŭ „politika toleremo”. Same klare estas, ke la aktivaj sportistoj kaj organizaj oficialuloj devas rezigni pri ajnaj publikaj provokaj aktivecoj kontraŭ Ĉinio dum la Ludoj. Sed alia afero estas la individua sinteno kaj konduto de la partoprenantoj. „Ne estas ĝusta vivo en la malĝusta.” Tiu konata frazo de Adorno bone trafas la situacion en Pekino.

La homaj rajtoj kiel identigilo de senperforta demokratio ne estas disponigeblaj pro sportaj interesoj. Oni do trankvile permesu al la individuaj sportistoj persone esprimi sin senprovoke laŭ sia propra idearo, se tio en apartaj situacioj bezonatas kaj konvenas. Ne povas esti buŝumoj!

Wolfgang GUENTHER
Germanio

Ĉu bojkoto? (13)

Ne estas vere, ke Ĉinio neniam invadis aliajn landojn. Ne nur pro tio, ke en 1950 Ĉinio invadis sendependan Tibeton. La 20an de oktobro 1962 Ĉinio invadis la baratan teritorion, ŝajniginte amikecon antaŭe. Barato tial ne estis preparita por la perfido. La barata ministro pri defendo Krishna Menon pro tio abdikis.

Mi scivolas, ĉu estas esperantistoj en Tibeto. Se jes, ĉu estas dialogo inter ili kaj la ĉinaj Esperanto-parolantoj? Ĉu tiuj ĉi komprenas la volon de la tibetanoj por libereco kaj sendependeco?

Milind JOSHI
Britio

Okulanimalo

„La homo estas okulanimalo. Ĝi perceptas la mondon naŭdekprocente per la okuloj.” Tiun „sciencan” eltrovon nun ankaŭ MONATO sekvas, same kiel multaj aliaj publikaĵoj. Esperanto kaj MONATO laŭdire ja estas lingvo kaj gazeto tute kiel la aliaj ...

Maljunuloj certe ne plendas, ke la titoloj de la artikoloj estas ekscese grandliteraj. Sed post la titoloj ili preferus tekstojn sur klara blanko, ne ene de nigra aŭ griza grafikaĵo, kaj literotipojn je eble du punktoj pli grandajn. Ni ja volonte akceptas fotojn, emblemojn, grafikaĵojn, tabelojn ktp ilustrantajn la tekstojn. Sed ni, gazetuloj, kapablas kaj volas legi. Bonvolu rigardi en MONATO de junio nur la paĝojn 12-13, 15, 18. Tie aperas sub aŭ apud la tekstoj bildoj duoble pli grandaj ol la teksto mem. Tio estas nura troigo.

Simpla peto: La fotoj ne superu la tekstojn, la tekstoj aperu bone legeblaj sur blanka fono. Post tiuj premisoj la grafikistoj havas ĉiam ankoraŭ ĉiujn eblecojn arte esprimi sin.

Franz-Georg RÖSSLER
Germanio

Israelo 60-jara

MONATO informis pri la 60-jariĝo de la juda ŝtato (MONATO 2008/7, p. 10-11). Laŭ mia opinio estis malbone elektita la loko por la nova ŝtato (ankaŭ

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

la Majstro pensadis pri nova loko por hebreoj). Jam 14 tagojn post la estiĝo de la nova ŝtato komenciĝis la bataloj kun la origina loĝantaro ... la bataloj daŭras ĝis hodiaŭ kaj neniam finiĝos!

František HORÁČEK
Ĉeĥio

Israelo 60-jara (2)

Se mi bone memoras, la Brita Imperio proponis al la cionistoj teritorion preskaŭ ne loĝatan en la afrika regiono de la lago Viktorio, sed la ĉefoj de la cionisma movado rifuzis.

Al interesatoj pri la israela-araba-palestina konflikto mi varme konsilas la legadon de la tre bona libro de la israela historiisto Benny Morris *Viktimoj*, kiu interalie bone evidencigas, kiel la gvidantoj de la cionismo tute bone konsciis (kontraŭe al la „ordinaraj” cionistoj, forfuĝantaj el la eŭropaj persekutoj, kredantaj la miton de „senpopola lando por popolo senlanda”), ke la koloniado de Palestino kaŭzos akran konflikton kun la jam enloĝanta popolo. Tiuj gvidantoj respondecas pri la ĝisnune verŝita sango, kaj la estonta historio severe juĝos ilin.

Andrea FONTANA
Italio

Granda frato gvatat

Kompreneble la agado de *Lidl* kaj similaj superbazaraj firmaoj, kiuj prispionas siajn laboristojn en situacioj, kiam tiuj havas rajton je plena privateco, estas skandalo kaj normale ne okazu. Tamen gvatado en publikaj lokoj estas tute alia afero, kaj la polico rajtas ja scii, kio okazas surstrate, ne gravas ĉu per okuloj de promenanta policisto, ĉu per okulo de kamerao. La lasta certe ne ĉiam povas anstataŭi veran policiston, sed ja homo ne povas esti ĉiam surloke.

La celo de la sistemo estas sekureco de la civitanoj. Laŭ la artikolo *Fratigo fiaskas* (MONATO 2008/7, p. 7), en Britio ĝi ne funkcias tro bone. Tamen en Bjalistoko mi ĉiam legas en gazetoj pri krimuloj malliberigitaj pro tio, ke sur filmo oni registris ilin farantajn

deliktojn aŭ eĉ krimojn nokte, kiam mankas preterpasantoj. Tia registraĵo povas esti gravega pruvo. Instalado de tia kamerao ankaŭ timigas eventualeajn malbonulojn.

En la artikolo Stefan Maul taksis la laboron de la gvatspektantoj „teda”, „temporaba” kaj uzebla „nur por jen kaj jen trovi eventuale iun scenon, kiu ŝajnas ne kongrui kun leĝo”. Tian opinion mi trovas nemotivita, ĉar same ni povas kritiki la laboron de fajrobrigadistoj, kiuj nur „eventuale” estingas kelkfoje fajron kaj dum tutaj tagoj faras nenion ... ĉu tio estas justa? Ĉu ni maldungu fajrobrigadistojn tial, ke ne dum la tuta tagnokto ili estingas fajron?

Przemysław WIERZBOWSKI
Pollando

Granda frato gvatat (2)

Ĉu eble tiu falsa sekureco estas dezirata? La politikistoj povas diri, ke ili jes ja faras ion por prizorgi la sekurecon de la popolo (precipe en antaŭvoĉdona periodo), kaj multaj certe pensas, ke tio vere subtenas la menciitan celon. Sed ĉu iu ankaŭ pripensas, ke teroristoj (aŭ aliaj fiuloj) ofte alie pensas, ol la „leĝon sekvanta civitano”, ke ili ne timas, ĉu iu post la farita krimo ekscios, kiu faris tion? Ke tiuj personoj eble eĉ fieras, ke ili faris tion „sub la okuloj” kaj tamen nenio povis malhelpi tion?

Peggy LEY
Germanio

Granda frato gvatat (3)

Laŭ mi, ne la ĉeesto (en publikaj lokoj) de gvataparatoj signifas la veran danĝeron por onia privateco, sed la maniero, kiel potenculoj traktas/ disponas nekontrolate la registritajn vid-datenojn. Sekve, ĉiam ajn la ŝtata potenco povas uzi nekontrolate tiujn datenojn por „maldemokratiaj” celoj: ĝi povas ĉantaĝi ajnan politikan kontraŭ-partiulon per privataj aferoj, kiuj kvankam ne tuŝas leĝon, sed tamen povas esti publike ĝenaj rilate al gvatito.

Pri la trarigardado de surbendigaĵoj: oni bezonas finspekti ne ĉiun surbendigaĵon, sed nur tiujn (kutime post iu grava evento), kiuj verŝajne kaptis „interesajn” aferojn.

Fine mi asertas, ke se tiaj agadoj estas kontrolataj fare de ombudsmanoj, tiuokaze la gvatsistemoj en publikaj lokoj povas esti utilaj.

Laszlo Istvan TOTH
Hungario

Granda frato gvatat (4)

Kial grandiĝas la populareco de gvatkameraoj nuntempe, ĉu en Eŭropo, ĉu en Azio, en la tuta mondo? Ĉar terorismo forte timigas ne nur registraĵojn, sed ankaŭ la tutan loĝantaron. Ĉiuj deziras vivi la vivon en medio sekura kaj sendanĝera.

Pro la rapida progreso de sciencoj kaj tekniko, oni faris multajn altnivelajn instalaĵojn (inter ili la gvatkamerao), kiuj helpas al la tuta popolo. Danke al ĝi la policistoj povas facile trovi fiulojn, kompreneble kulpajn kaj malliberigindajn. Tio sekurigas la socion kaj liveras al la ordinara homoj bonan vivkondiĉon. Kompreneble en certaj lokoj gvatkameraoj estu malpermesitaj. La kialon Stefan Maul bone klarigis.

Xu Jinming
Ĉinio

Gigantismo (3)

En la porevolua propagando la interesatoj zorge prisilentas tiun timigan fakton, ke ĉio, kio aperis kiel grava progreso en industrio en la 20a jarcento kaj ankaŭ nun, apogas sin je tiu energio, nomita „fosilia energio”, kiu akumuliĝis en teraj tavoloj dum 600 milionoj da jaroj. Tiun kvanton da energio la homaro forkonsumas dum apenaŭ kelkaj generacioj. La tuta vivo-filozofio de niaj elektitaj respondeculoj pri la homara estonto priskribebblas per la konata esprimo: *Carpe diem*. Se la homaro uzus nuklean energion por kovri sian tutan aktualan energibezonon, tiuokaze, laŭ la leĝo de grandaj nombroj, la nukleo-centra-

laĵ difektiĝoj estus tiom oftaj, ke tio grave danĝerigus la tutan biologian sistemon sur Tero.

Tutmondiĝo kaj konsumsocio eĉ pli pelas la homaron al senbrida malŝparado pri energio kaj bazmaterialoj, kaŭzas eĉ pli rapidan elĉerpiĝon de fosili-energiaj rezervoj.

Pri la lastaj kvantoj de fosilia energio disponos nur potenculoj, ĉar ĝis tiam la procezo de sen-demokratiigo jam atingos tiun „sufiĉan“ gradon, ke la plimulto de la loĝantaro jam ne plu havos eblon protesti, defendi siajn rajtojn. Ĉu vi miras pri tiu aserto? Nu, sufiĉas analizi la „miraklan efikon“ de niaj amas-stultigiloj (televideo, radio ktp) por ekkompreni tiun procezon. Malsinceraj reklamoj, propagandoj, kiujn kompilis *fakuloj* pri kiel influ pli efike subkonscie oniajn opiniojn, animojn, servas ĝuste por superruzi demokration.

La „profesie“ stultigitaj amasoj de homoj sekvas silente kaj blinde la ruze difinitajn „itinerarojn“ kaj submetas sin *kadre de demokratiaj reguloj* al la volo de siaj tiranoj.

Tutmondiĝo signifas monopolon pri socio. Monopolo pri socio signifas tion, ke malaperas la necesa konkura-

do inter socioj kaj, kiel konsekvenco, loĝantoj ne plu havos la eblon elekti iun „pli bonan“ ŝtaton, ĉar ili ĉie alfrontos la samajn kondiĉojn. Diversaj registaroj kuniĝas en socian „kartelon“.

La pli vigle atentemaj civitanoj povis rimarki la malbonan efikon post la disfalo de tiu „alia“ socio, markita per ĝia inta kerno Sovetio. Fakte en Eŭropo malaperis la konkurado inter la du plej signifaj socioj, kaj la vivnivelo por larĝaj amasoj de homoj perdis en kvalito ene de la tradiciaj kapitalistaj landoj. Neniam antaŭe spertiĝis tiom da malcerteco en vivsekureco.

Pinte de tiu fenomeno staras tiu G8-„formacio“, al kiu baldaŭ aliĝos ankaŭ aliaj registaroj.

Laszlo Istvan TOTH
Hungario

Angla Germanio

Jen rakonteto reage al la enkonduko julia (*Subpremo lingva*, MONATO 2008/7, p. 5). Antaŭ kelkaj monatoj ni ricevis anglalingvan pag-admonon de germana enkasiga oficejo pri iu juvelo, kiun ni ŝajne aĉetis (ni ne scias, ĉar ne estis menciita pri kiu firmao temas). Malgraŭ nia reago en la germana (kaj

por la certeco ankaŭ en Esperanto), ke ni loĝas en germanlingva parto de Belgio, daŭre venis admonoj anglalingvaj.

Ĝis nun ni tute rifuzas pagi kaj finfine venis reta reago, ke la dosiero reiris al ilia kliento (ni supozas tion, ĉar denove la mesaĝo estis en la angla). Estas nekredeble, ke ni devas postuli de germana firmao, ke ili skribu germane. Eble ili (devige) skribas eksterlanden nur en la angla.

Rita GALMACHE
Belgio germanlingva

Ĉu ŝtormo en ambono aŭ en predikseĝo?

Malgraŭ la abundo da bono en mia amo ... mia ambono do, mi ne aprezas la miskorektojn en mia teksto Mahometkonsola! (*Ĉu ŝtormo en tetaso - aŭ en ambono?*, MONATO 2008/7, p. 24-25) Ambono ne estas predikseĝo, eĉ se oni tie povas prediki! Cetere: ŝtormo en ambono estas sensencaĵo! Ambono ne havas kuvon, predikseĝo jes.

Se katedralo estas katedra preĝejo, tamen ne ĉiu preĝejo estas katedralo!

Petro DE SMEDT
Belgio

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.“

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Perdata influo

de Stefan MAUL

La okcidento, reprezentata precipe de Usono kaj de (la malnova?) Eŭropo ade perdas, grandparte jam perdis mond-influn. La usonanoj, pro la Irak-milito kaj la lama prezidanto, deziras foriri el la respondeco pri la cetera mondo. La fiasko en Bagdado kaŭzas, ke pli kaj pli multaj usonanoj opinias, ke la registaro zorgu nur pri propraj, enlandaj aferoj. Interkonsento pri eksterlanda politiko, la fundamento de la superpotenco, ne plu ekzistas. Sur la malnova kontinento civitanoj aplaŭdis al la negativa referendumo en Irlando pri EU-traktato. Ili neglektas, ke per tio fiaskis la provo, pligrandigi la pezon de Eŭropa Unio en la mondo.

Konfliktoj ne solvataj

Ni rigardu aktualajn konfliktojn kaj problemojn. En Afganio daŭras milito same kiel en Irako. En Zimbabvo freneza prezidanto malvenkas en baloto kaj tamen regadas per brutala reĝimo. En Birmo mortas homoj pro malsato, ĉar regantaj generaloj malpermesas ĉian eksterlandan helpon. En Sudano daŭradas interbuĉado. Tibetanoj plu estas subpremataj de Ĉinio. Pri Irano, pro planado de atombombo, la usona prezidanto Bush [buŝ] oficiale subtenas diplomation eŭropan, sed sekrete preparas militon. Intertraktado pri paco inter Israelo kaj palestinanoj neniel progresas. Neniun el tiuj krizoj kaj konfliktoj la okcidento kapablas solvi. Ĝi perdis siajn iamajn potencon kaj reputacion en la cetera mondo, kiu ne plu akceptas okcidentajn admonojn kaj konsilojn.

Orienta alternativo

Krome en oriento strategiistoj de Rusio kaj Ĉinio konstruas alternativan mondon, serĉante aliancinojn por sia nova kaj propra ordo. Ili repuŝas influon de Vaŝingtono kaj lamigas Unuiĝintajn Naciojn (UN). La nova rusa prezidanto Dmitrij Medvedev konscie

elektis kiel unuan vojaĝocelon Pekinon. Li volas instalii rublon kiel gvidan valuton en la sfero de la iama Sovetio. Fonto por tio estas profitoj el altegaj nafto- kaj gas-prezoj. Dume Ĉinio triumfas per ekonomia prospero kaj kiel plej granda kreditoro de Usono: ĝi posedas usonajn ŝuldatestojn en valoro de 1,7 miliardoj da dolaroj. Tiaj sumoj igas Usonon ĉantaĝebla. Moskvo kaj Pekino komune logas centran Azion, interligas sin kun Barato kaj Brazilo, cetere sen iu ideologio krom ekonomiaj interesoj.

Tiuj reĝimoj strebas al internacia ordo, kiu permesas al ili interne agadi laŭplaĉe, sen ĝenaj ordonoj de demokratio, jurŝtato kaj homaj rajtoj. Ni vidas jam parte, kiel povus aspekti tia estonteco: generaloj en Birmo povas neglekti malsaton de la popolo, despotoj en Sudano kaj Zimbabvo senti sin sekuraj kontraŭ humanec-postuloj eksterlandaj. Ĉinio protektas, Rusio helpas ilin. Pro ambaŭ ankaŭ UN estas senpova. Usono kaj EU devas decidi, ĉu ili volas vivi en tia mondo.




PETER FLUGIS

Ĉinio konstruas alternativan mondon, serĉante aliancinojn por sia nova kaj propra ordo

Necesas dialogo

Sed la problemoj estas, ke la okcidento perdis parte sian bazon de komunaj idealoj kaj valoroj. La „milito kontraŭ teroro“ de Bush kaj precipe lia misiista krucmilitiro kontraŭ Irako kreis abismon inter Usono kaj granda parto de Eŭropo, ĉar en la malnova kontinento oni ne akceptis, ke Bush neglektis gravajn ideojn kaj valorojn de la komuna okcidenta humaneco. Grave suferis okcidentaj frateco kaj sistemo de samaj interesoj. Sekve la alianco okcidenta ne plu kapablas formi la mondon per ideoj kaj potenco. Kie estas la komunaj strategioj por mondo sen nukleaj armiloj aŭ por klimaprotekto? Sed kaj EU kaj Usono solaj estas tro malfortaj. Urĝe necesas honesta dialogo de ambaŭ pri ilia estonta rolo en la mondo. Ne sufiĉas, atendi la eraon post Bush. ■



ANTHONY SHEN

La nova rusa prezidanto Dmitrij Medvedev konscie elektis kiel unuan vojaĝocelon Pekinon.



BORGERS

REAGO

Kapskuo

Forta argumento por Esperanto estas la protektado de etnaj lingvaj propraĵoj. Sed esperantistoj estas nature ankaŭ internaciistoj. Tial ili havas problemojn pri etnaj kulturaj/religiaj propraĵoj. Modele montras tion la artikolo de la kolego Ipfelkofer. Kiel artisto kaj bonulo li argumentas por la rajto porti ankaŭ en oficialaj civilaj cirkonstancoj ian identigan kaptukon.

Koncedite, ankaŭ kristanaj monaĥinoj portas kaptukojn en civilaj cirkonstancoj. Certes mi malaprobis tiun ĉi obskurismon, se ĝi ne apartenus al mia dumiljara kulturo. Tial mi defendas ĝin kaj samtempe atendas ĝian malaperon. Sed tia obskurismo propratradicia sufiĉas al mi. Mi ne bezonas importi pliajn. Tial mi malaprobas la mem-

evidentigan, memapartigan aperon de aliaj kulturaj/religiaj trajtoj en mia medio. Estas sufiĉe da plibonigendaĵoj en mia germana socio. Mi ne volas klopodi pri postrestintaj teniĝoj de aliaj kulturoj en mia lando. Tial mi ne toleras ankaŭ la hipokritan „justecon“ kaj de aŭtoroj kaj de verdulpartiaj ĉefinoj, kiuj preferus senvualigi kristanajn monaĥinojn kaj forprenus krucojn el la lernejoj.

Se mi bone aŭskultis la novaĵojn, la turka supera kortumo rifuzis la leĝon deklaran de la aktuala turka registaro, repermisi la kaptukon en la universitatoj. Ĝi kontraŭis la ataturkan laikan ŝtaton. Do, pli turke ol la turkoj mem ni ne devas esti.

Franz-Georg RÖSSLER
Germanio

La turka supera kortumo rifuzis la leĝon repermisi la kaptukon en la universitatoj.

MILITO

Bomb-ardo senkiala

En aprilo 1999 detruis raketo parton de la konstruaĵo de Radio-Televido de Serbio. Dum la bombardo de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO) pereis 16 plejparte junaj kunlaborantoj de la televida stacio. La konstruaĵo ne estas renovigita kaj nun staras kiel memorigilo pri absurda, sen-senca atako.

Tiama Jugoslavio ne militis kontraŭ NATO. La pereintoj ne estis soldatoj, nur laboristoj ĉe sia labor-loko. Nun situas ekster la ruino monumento kun la nomoj de la murditoj kaj la demando: „Kial?“. Aprile familianoj kaj dungitoj de Radio-Televido de Serbio metas florojn sur la monumenton kaj ripetas sian ĝis nun senrespondan demandon.

Dimitrije JANIČIĆ



DIMITRIJE JANIČIĆ

Monumento pri la NATO-atako reliefigas la demandon: „Kial?“

NACISMO

Hejmeniru!

Traktado de albanoj en Eŭropo indikas, ke kreskas naciismo en Eŭropo. Ekzemple, post la venko de dekstraj partioj en Italio, grupeto da italaj naciistoj haltigis surstrate albanan lernejon 13-jaran. Tiu, laŭleĝe loĝante en Italio kun siaj gepatroj, estis survoje hejmen el la lernejo. La knabo estas batita, kiam li ne sciis, kiel respondi al demando: „Kial vi ne reiras en vian hejmlandon?“

Suferas ankaŭ artistoj. La albana baletisto Kledi Kadiu, aperinta en la televido, ricevis leteron, en kiu la skribinto petis, ke li hejmeniru. Ankaŭ la albanan skulptiston Gezim Hidri, laborantan en sia ateliero en Londono, vizitis subite anoj de la brita enmigra servo, kiuj lin ellandigis, ĉar ne plu validis lia restad-permeso.

Bardhyl SELIMI

Desapontas del Ponte



Dum la kosova milito supozeble estas starigita hospitalo, kie oni „estas elpreninta vivorganojn el serbaj kaptitoj fare de Liberiga Armeo de Kosovo”.

En printempo aperis libro verkita de la eksa ĉefprokuroro ĉe la tribunalo pri militkrimoj aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Hago, Nederlando. La tribunalo esploris militkrimojn i.a. en eksa Jugoslavio, sed en sia libro, *La Ĉasado*, svisino, akuzas albanojn pri krimoj kontraŭ serbaj etnuloj. Asertas la aŭtorino, ke „almenaŭ 300 serboj estas arestitaj kaj forportitaj internen de Albanio, kie oni elprenis vivajn organojn por ilin transplanti”.

La akuzo skuis publikan opinion en Albanio. Televida stacio ekigis esploron en la distrikto Mat, en la vilaĝo Gurra, ĉe la domo de Avdulla Katuĉi. Tie dum la kosova milito supozeble estas starigita hospitalo, kie oni „estas elpreninta vivorganojn el serbaj kaptitoj fare de Liberiga Armeo de Kosovo”.

Hospitalo

Tamen jam en 2004 internaciaj enketistoj vizitis la vilaĝon kaj serĉis indikojn pri la „krimoj”. Ili kontrolis la plurĉambran, duetaĝan domon, kie laŭakaze staris la hospitalo, sed trovis nenion. Nun albanoj kredas, ke la asertoj de del Ponte celas ekvilibrigi la krimojn de la eksaj serbaj armeo kaj polico kontraŭ sendefenda kaj suferanta popolo en Kosovo.

La svisa departemento pri eksterlandaj aferoj malpermesis al s-ino del Ponte ĉeesti la lanĉon en Milano de sia libro. La departemento argumentis, ke la libro enhavas opiniojn, kiuj malkongruas kun tiuj de la svisa registaro, kiun reprezentas del Ponte kiel svisa ambasadoro en Argentino.

Bardhyl SELIMI



Carla del Ponte, la eksa ĉefprokuroro ĉe la tribunalo pri militkrimoj aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Hago, Nederlando



La svisa departemento pri eksterlandaj aferoj malpermesis al s-ino del Ponte ĉeesti la lanĉon en Milano de sia libro.



Majo 2008: NATO-soldatoj gardas ordon en Kosovo dum grandaj publikaj eventoj

NOV-ZELANDO

Jam komenciĝis elektoj

Nepras parlamenta baloto en Nov-Zelando iam antaŭ la fino de 2008. Tiam la ĉefministro, s-ino Helen Clark [klak], kaj ŝia Laborista Partio, estos regintaj dum naŭ jaroj. Tamen la politika pejzaĝo ŝanĝiĝis post la lasta balotado en 2005. La Nacia Partio havas novan estron, la relative freŝan parlamentanon kaj eksan bankiston John Key [ĝon ki]; la Verda Partio havas novan kunestron en Russel Norman [rasl noman].

Cetere, komence de 2008 la ekonomio malboniĝis. La ĉefo de la nacia rezerva banko avertis, ke promesitaj reduktaj enspezimpostoj povus pliigi inflacion. Aliflanke, en aprilo la ministro pri financoj Michael Cullen [majkl kaln] atentigis pri la atingoj de la registaro: rekorda dungiteco kaj senlaboreco de malpli ol 4 % dum kvar jaroj; pli favoraj laborleĝoj, inkluzive de kvar devigaj ferio-semajnoj, anstataŭ tri; altigoj de la minimuma salajro; plibonigo de la ŝtata akcidentkompensa sistemo, de pagata

forpermeso por gepatroj de novnaskitoj, kaj de la leĝoj pri sano kaj sekureco ĉe laborlokoj; nova nedevisa ŝparsistemo por kuraĝigi ŝparadon por emeritiĝo; subteno por malriĉaj familioj; pli da elspezoj por sano, edukado kaj sociaj problemoj.

Ekonomia kresko

Krome kreskas kaj plivigliĝas la urboj, kiuj ŝajne stagnis en la 1990aj jaroj. Fakte Nov-Zelando ĝuis la plej longan periodon de ekonomia kresko dum la lastaj 60 jaroj. Meza jara kresko post 1999 estis je unu elcento pli ol la mezo de la landoj en la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE).

Tamen restas problemoj: altaj interezoj, pliigantaj prezoj por manĝaĵoj, benzino kaj domoj. Rezulte kritikis la registaron la ĉefo de la Nacia Partio, John Key. Li aparte atakis la reaĉeton de la fervojoj kontraŭ miliardo da novzelandaj dolaroj. En 1993 la registaro,

tiam estrata de la Nacia Partio, vendis la ŝtatajn fervojojn malaltpreze al eksteralanda kompanio, kiu intertempe malbone prizorgis la trajnojn kaj la trakojn.

Novaj leĝoj

Key kritikis ankaŭ novan leĝon pri financado de parlamentaj elektoj (por malpermesi anonimajn donacojn al politikaj partioj) kaj pligrandigon de la nombro de ŝtatoficistoj (por efektiviĝi novajn leĝojn). Li prezentis proprajn platformojn kaj politikon, interalie: daŭre redukti la personajn enspezimpostojn; redukti la ministrejajn burokratarojn; plialtigi la edukajn nivelojn; investi por plibonigi infrastrukturon (vojojn, rapidegajn komputilajn retojn, elektropovon) kaj sciencan esploron.

La partio ankaŭ modifis sian sintecon pri klimata ŝanĝiĝo. Antaŭe ĝi subtenis la opinion de la usona prezidanto Bush, sed lastatempe ĝi konstatis, ke „la mondo kaj ties konsumantoj pli kaj pli konscias pri mediaj aferoj, karbondioksida nivelo kaj tutmonda varmiĝo”.

Subteni familiojn

La ekonomikisto Chris Worthington atentigas, ke la netaj enspezoj de novzelandanoj daŭre kreskis dum la lastaj 15 jaroj. La registaro ŝanĝis impostojn por subteni familiojn, kio signifas, ke pliĝis rimedo-transiro de riĉaj al malriĉaj tavoloj de la socio.

Tamen malgraŭ la atingoj de la registaro de Helen Clark, opini-sondoj en majo 2008 indikis, ke, se parlamentaj elektoj estus tiam okazintaj, la Nacia Partio venkus per pli ol 50 % de la voĉoj. Do estos interese vidi, ĉu tiu ĉi sinteno rezultigos malvenkon de la Laborista Partio de Helen Clark en oktobro-novembro.

D. E. ROGERS



Tamen restas problemoj: altaj interezoj, pliigantaj prezoj por manĝaĵoj, benzino kaj domoj.

Unueco kaj diverseco

En la homa socio ekzistas leĝo pri grupa tendenco unuecigi konduton de individuoj en grupo por uniformigi la homojn. La tendenco venas de la bezono rekoni anojn de la propra grupo, al kiu oni povas konfidi. Tio signifas, ke la socio devigas unuopulon paroli la lingvon, kiun parolas la plimulto, akcepti la religion, kiun havas la plimulto, identiĝi kun la valoroj kaj ideologioj de la plimulto, ofte eĉ akcepti modajn vestojn, muzikon, idolojn ktp.

Sed al diversaj grupoj ofte aliĝas aliuloj, kaj la grupoj pro diversaj kaŭzoj miksigaĝas. Tiam la plimulto aŭ tiuj, kiuj estas pli fortaj, klopodas devigi la malsamulojn ŝanĝi sian konduton kaj unuecigi ĝin kun tiu de la plimulto. Eblas facile influi novnaskiton per edukado, sed preskaŭ ne eblas influi la kondutmanieron de jam edukformita plenkreskulo: rezulte ekestas konfliktoj. Kiel oni tion solvas?

Asimiliĝi

1. Perfortante kaj devigante la aliulojn asimiliĝi (ne-neŭtrala solvo):

a. kiam Germanio aneksis Aŭstrion, ĝi devigis tiun akcepti germanan monon;

b. kiam Francio okupis insulojn en Hinda Oceano, la loĝantoj tie fariĝis francoj;

c. kiam hispanoj okupis Sud-Amerikon, indianoj devis fariĝi katolikoj;

ĉ. kiam angloj koloniis Hindion, la oficiala lingvo de Hindio fariĝis la angla;

d. kiam Ĉinio okupis Tibeton, tibetanoj devis akcepti la ĉinan leĝaron kaj konstitucion;

e. kiam Aŭstro-Hungario okupis Bosnion, tiu devis akcepti aŭstrajn ŝtatsimbolojn;

f. kiam komunisma Sovetio okupis Pollandon, tiu devis akcepti la komunismajn ideologiojn kaj ŝtatsistemon.

Akcepti

2. Per kompromisa neŭtrala solvo, kiun ambaŭ aŭ pluraj povas akcepti:

a. kiam Eŭropa Unio (EU) enkondukis komunan monon, ĝia nomo fariĝis neŭtrala „eŭro”, kaj la monbiletoj surhavas neŭtralajn komunajn simbolojn (pontojn, pordojn);

b. kiam ekestis komuna ŝtato de kroatoj, serboj, slovenoj, makedonoj, albanoj ktp en 1945, oni prenis la neŭtralan nomon Jugoslavio kaj ekkonstruis novan ŝtatanekon jugoslavan;

c. kiam venkis la franca revolucio, oni proklamis sekularan ŝtaton (forigon de eklezia organizaĵo el la ŝtataj aferoj), do la liberon por ĉiu mem elekti religion aŭ ateismon kaj la malpermeson devigi iun ajn akcepti la dominan religion de la ĉirkaŭaĵo;

ĉ. kiam en 1945 fondiĝis Indonezio kun 17 000 insuloj, sur kiuj loĝas miloj da diversaj popoloj, oni enkondukis neŭtralan lingvon bazitan sur unu el la javaj dialektoj, sed kompletigitan per multaj vortoj el aliaj lingvoj kaj provizitan per simpligita gramatiko;

d. kiam fondiĝis nova ŝtato postrevolucia sur la teritorio de Rusio en 1917, oni akceptis novan juran sistemon;

e. EU akceptis simbolojn kaj himnon neŭtralajn;

f. demokratiaj ŝtatoj ne devigas personon je unu centra unueca politikideologio, sed permesas plurismon (iaspecan politikan sekularecon), kaj do ĉiu mem decidas, kiun politikan pensmanieron li aŭ ŝi transprenos.

Transformiĝi

Kiel videblas, la neŭtralaj solvoj dividiĝas je du specoj:

a. oni akceptas rimedon, kiu unuecigas (ĉar ĝi grave kontribuas al ekonomia efikeco); sed tiel, ke oni akceptas ne rimedon de iu el la grupoj, kiuj mem-



Pluraj eŭropaj kontraŭdiraĵoj estas solvitaj per neŭtralaj solvoj (neŭtrala rimedo por ĉiuj aŭ pluraj rimedoj sur merkato).

bras en la komunaĵo, por ke tiu ne havu avantaĝojn, sed novan solvon, kiun ĉiuj pro la neŭtraleco akceptas, kvankam ĝi ekhavas pli superan funkcion, ol havas la unuopaj solvoj;

b. oni akceptas nenian komunan solvon, sed lasas ĉiujn solvojn je dispono de tiuj, kiuj surmerkate batalas por sia pozicio; sed ĉiuj estas egalrajtaj. Tiu solvo povas facile transformiĝi al ne-neŭtrala (perforta), ĉar la batalo sur la merkato plej ofte kondukas al venko de la plej forta, kiun oni poste trudas al aliaj. Ekzemple la egalrajteco de religioj (sekulareco) daŭre troviĝas en danĝero, ke la plej forta religio (ekzemple katolika) devigos aliajn certamaniere akcepti duagradan pozicion. La postuloj, ke en la EU-konstitucion oni enmetu specialan rolon de la katolika religio, montras tiun tendencon.

Solvi

Verŝajne klaras al ĉiu, ke en Eŭropa Unio ne eblas apliki la ne-neŭtralajn solvojn, kiuj uzas perforton. Pluraj eŭropaj kontraŭdiroj estas solvitaj per neŭtralaj solvoj (neŭtrala rimedo por ĉiuj aŭ pluraj rimedoj sur merkato).

La lingva demando estas solvata per la merkata sistemo. Ĉiu lingvo estas samrajta batali sur la merkato por la spaco, kiun ĝi okupas. La merkato decidis, ke la plej forta lingvo fariĝis la ĉefa laborlingvo. La merkato praktike aplikis la ne-neŭtralan solvon kaj devigis sen interkonsento ĉiujn aliajn submetiĝi en internacia eŭropa komunikado al la centra funkcio de la angla.

Zlatko TIŠLJAR

ALBANIO

Fero-infero



ZIGA-ZIGA

Antaŭ nelonge okazis tragedio en metalurgia uzino en centra Albanio. Inter feraj rubaĵoj, reuzotaj por produkti ŝtalon, troviĝis bom-

bo neeksplozinta. Kiam oni enverŝis la rubaĵojn en la fandejon, la bombo tuj eksplodis. Mortis du laboristoj, kaj vundiĝis aliaj. Bezonos la ne plu produktiva uzino multajn riparojn.

La polico arestis tri respondeculojn pri sekureco, kaj la prokurorejo esploras, kiel la bombo enmiksiĝis en la ferĉifonaĵoj. Ĉio indikas mankon de atento dum la kolektado de feraj postrestaĵoj ĉe entreprenoj, kiuj interesiĝas nur pri mongajnado danke al la vendado de la fero. Cetere en Albanio ankoraŭ cirkulas grenadoj kaj aliaj armiloj disvastigitaj dum la tumultoj de 1997.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

Por plori, por ridi

Jardekojn antaŭe la komunisma reĝimo de Albanio decidis inviti la turkan humoriston kaj opoziciulon, Azis Nesin. Helpis tiurilate albana tradukisto de la turka, kiu dum sia junaĝo ekkonis Azis Nesin en lernejo en Turkio.

Tuj antaŭ la vizito la sekreta polico arestis la tradukiston „pro propagando kontraŭ la popola ŝtatpotenco”. La Ligo de Verkistoj embarasiĝis, ne sciante, kiel klarigi al la turka gastulo la aferon.

„Ĉu diri, ke la tradukisto enhospitaliĝis?” „Ne, ĉar Azis petus renkonti la malnovan amikon en la hospitalo.” „Ĉu diri, ke la tradukisto suferas pro infekta malsano?” „Ne, ĉar Azis petus saluti sian amikon almenaŭ de malproksime.”

Finfine oni decidis diri, ke la tradukisto mortis. Por „pruvi” la morton, la instancoj starigis memortabulon en tombejo. Azis Nesin neniam eksciis pri la sorto de sia samklasano, kiu ebligis al li viziton al Albanio.

Bardhyl SELIMI



ISTADLER

ALBANIO

„Kial mi ne aperas, panjo?”



THE IMAGE

En Albanio divorcoj relative maloftas, des pli maloftas ripetitaj nuptofestoj. Tamen jen la decido de Mariza (29-jara) kaj Ergys Verdha (34-jara). La paro feliĉe kunvivas dum 10 jaroj kaj antaŭ kvin jaroj geedziĝis. Unu jaron poste naskiĝis filo, Aleksander.

Tamen kiam Mariza montris fotojn pri la nuptofesto al sia filo, tiu demandis: „Kial mi ne aperas ĉe via nuptofesto, panjo?” Rezulte okazis dua nuptofesto, en kiu ja aperis Aleksander, ceremonie vestita. Sekvis dua, kaj ĉi-foje senpaga, mielvojaĝo, pagita de turisma agentejo.

Bardhyl SELIMI

Ja-pan-io kaj butero

Pano estas ĉiam akompanata de butero. Tamen la akompananto estas malaperonta de sur japanaj manĝotabloj. Kaŭzis la mankon de butero manko de kruda lakto. Ĝis antaŭ du jaroj kruda lakto estis abunda, ĉar oni uzis malpli da lakto por tagmanĝoj de malmultiĝantaj geknaĵoj en elementaj lernejoj.

Pro tio en 2005 oni komencis malaltigi la nombron de bovinoj en Hokajdo kaj en Kjuŝuu. Multaj bienuloj do forlasis sian okupon. Dum 2007 en Hokajdo, kie laktoproduktado estas plej furora, 197 produktistoj (2,6 %), kaj en ceteraj regionoj 971 (6,2 %), trovis alian laboron. En Japanio en 1963 rekorde ekzistis 417 600 laktoproduktistoj, sed en aprilo 2008 estis nur 21 000. Cetere japanaj laktoproduktistoj dependas de importita nutraĵo kiel maizo, kies prezaltiĝo ilin multe suferigis.

Superbazaroj

Tiamaniere ĝenerale lakto fariĝis mankema, sed nun precipe nur butero mankas. La kialoj: unue manĝaĵo-produktantoj komencis uzi japanan



DANIS RECEPIES

Malfacilis al lokaj panistoj kaj kukistoj akiri buteron el eksterlandaj merkatoj.



AARON TD

Antaŭe importita butero estis pli malmultekosta ol la japana, sed lastatempe la prezo de butero internacie altiĝis.

buteron. Antaŭe importita butero estis pli malmultekosta ol la japana, sed lastatempe la prezo de butero internacie altiĝis. Pro tio malfacilis al lokaj panistoj kaj kukistoj akiri buteron el eksterlandaj merkatoj. Uzontoj do direktas sin al butero en superbazaroj, kaj sekve mankas butero por hejma uzo.

Due, eĉ se oni volas importi buteron, pro limimpostoj la prezo altiĝas, kaj krome en la internacia merkato ne abundas butero. Trie tri grandaj laktokompanioj turnis sin al pli da produktado de fromaĝo, ĉar la prezo de importita fromaĝo altiĝis. Pro tio produktistoj nun ne volas produkti pli da butero.

Konjekteble venos tempo, kiam ne eblos aĉeti manĝaĵon, eĉ se oni havas sufiĉe da mono. Japanio adoptis politikon aĉeti malmultekostajn manĝaĵojn el eksterlando, subpremane japanajn terkulturistojn. Tia politiko tamen ne validas en mondo, kie ĝenerale mankas manĝaĵoj. Eblas, ke, se Japanio ne ŝanĝos sian politikon, japanoj vivos post dek jaroj per rizo kaj iom da legomoj kiel antaŭ 100 jaroj.

HORI JASUO

Floras amikeco



LAST

Alma Adamkiene (maldekstre) ricevis sian aparte kreitan tulipon de la nederlanda ambasadorino Annemieke Ruigrok.

La edzino de la litova prezidanto Valdas Adamkus havas sian propran tulipon. Alma Adamkiene ricevis la tulipon, kreitan de la nederlanda floristo Jan Lichthart [liĥthart], de la nederlanda ambasadorino Annemieke Ruigrok [anemike rejĥrok].

Ruigrok diris, ke la nova tulipo, registrita kiel „Tulipo de Alma Adamkiene”, rekonas, kiom apogas infanojn la edzino de la prezidanto. La tulipo substrekas ankaŭ la amikecon inter Litovio kaj Nederlando okaze de ĉi-somera vizito de la nederlanda reĝino Beatrix al Litovio.

LAST



MORE BSN

Nederlando estas mondfama pro siaj tulipoj

SINMORTIGOJ

Mankas mono, mankas sano

En Japanio mortigas sin ĉiujare pli ol 30 000 homoj. En junio 2008 raportis la ŝtata polic-agentejo, ke en 2007 mortigis sin 938 homoj pli ol en la antaŭa jaro – entute 33093 homoj. Statistike propramane pereas plej ofte 60-69-jaruloj kaj 30-39-jaruloj.

En la pli aĝa grupo, konsistanta el 8451 personoj, ĉefaj kaŭzoj estas korp malsano (3644 kazoj), mensa malsano (2070) kaj malriĉeco (371). En la pli juna grupo, konsistanta el 3365 personoj, temas pri mensa malsano (996), korp malsano (346) kaj ŝuldoj (341). Aliaj kialoj rilatas al lacego pri prizorgado de malsanaj parencoj (pli aĝa grupo) aŭ malbonaj rilatoj kun kolegoj (pli juna grupo).

Ŝajnas, do, ke multaj maljunuloj, ofte malbone kaj nesufiĉe pensiitaj, malfacile vivas. Ne eblas trovi laborlokojn; familianoj ilin ne povas prizorgi; vivi en malsanulejoj tro multe kostas. Malriĉeco ofte kontribuas al la deprimado, kiu ilin pelas al sinmortigo.

Deprimado

Pli junaj homoj, kontraste, multe suferas ĉe siaj laborejoj. Kvar el kvin sinmortigoj en tiu ĉi grupo rilatas al laboro: mensa malsano (deprimado), korp malsano, lacego pro laboro kaj malbona rilato kun kolegoj. Japanaj kompanioj anstataŭigas plentempajn laboristojn per partatempaj. La plentempuloj devas labori du- aŭ tri-oble pli ol antaŭe por ŝtopi truojn kaŭzitajn de malpliigo de laboristoj. Partatempaj laboristoj sklave laboras laŭ postuloj de kompanioj, kiuj abrupte ĉesigas laborkontraktojn. Tiaj malkontento kaj maltrankvilo foje erupcias kiel sin-



mortigo, kaj ne malofte kiel krimo.

En ambaŭ grupoj gravas ŝuldoj. Fojfoje ne eblas al maljunuloj prunte preni monon. Ili do turnas sin al kontraŭleĝaj uzuristoj, kaj tiel amasiĝas ŝuldoj.

Aproba sinteno

En Japanio ekzistas aproba sinteno pri sinmortigo. Laŭ esploro en urbo en la gubernio Aomori, 30 % de la loĝantoj inter 40 kaj 69 jaroj kredis, ke permeseblas sinmortigo, se ekzistas gravaj kialoj por ĉesigi la vivon. En situacioj tiaj, 20 % de la enketitoj de la registara esploro konfesis, ke ili iam serioze pripensis sinmortigon. Multaj japanoj opinias, ke problemoj estas personaj, kaj do per sinmortigo solveblaj.

Lastatempa furoro estas kunaj sinmortigoj de gejunuloj, kiuj arigis kunmortontojn per Interreto. Antaŭe ili mortis per karbona monooksido eligita el bruliganta karbo. Lastatempe ili mortas per venena gaso el kunmetitaj banejoj purigaj medikamentoj. Multaj junuloj ne povas trovi vivcelon en la socio, kaj danke al hejmpaĝoj pri sinmortigo ili trovas pli facilajn rimedojn por tion efektivi.

HORI JASUO

URBOJ

Odeso- impreso

Ne vaste konata estas la monda asocio pri historie signifaj urboj. La asocio nombras ĉirkaŭ 70 urbojn, inter kiuj Romo, Parizo, Budapeŝto, Amsterdamo kaj Barcelono.

Fariĝi membro ne facilas. Ekzemple, ĝis nun, eĉ ne unu urbo en Rusio aniĝis. Tamen en junio la ukraina urbo Odeso estis akceptita en la asocio pro siaj historiaj kaj kulturaj tradicioj kaj pro riĉa arkitekturo.

Dmitrij CIBULEVSKIJ



Odeso, pro sia eminenta strato Deribasovskaja, sia ŝtuparo Potjomkin kaj sia oper-teatro, estis formale bonvenigata en la asocio de signifoplenaj urboj.



Krucifiksoj ...

En MONATO 2008/6 aperis la artikolo *Kaptukoj – kaj kapdoloroj*.
La afero daŭras ...

Malfacile imageblas, pri kio politikistoj en Germanio, precipe en Bavario, okupiĝas. En Germanio memkompreneble homaj rajtoj ĝenerale estas observataj, almenaŭ ili validas kiel leĝo. Jam la konstitucio de Weimar [vajmar] en 1919 konfirmis la devigan neŭtralecon de la ŝtato koncerne religiojn (art. 136 kaj sekvantaj).

Ankaŭ la aktuala konstitucio ordonas, ke praktikado de religio ne estu malhelpata (art. 4), ke ĉiuj religiaj asocioj havu samajn rajtojn (art. 140) kaj ke la ŝtato restu neŭtrala (art. 140).

Tamen ŝtataj instancoj intervenas en stranga maniero. En MONATO 2008/6 legeblas pri longdaŭra disputo pro kaptuko de islama instruistino. En Bavario ekzistas subleĝa dekreto (*Bayerische Volksschulordnung*), ke en ĉiu klasĉambro estu krucifikso aŭ kruco.

Pluraleco

Do la ŝtato, kiu ne havas la rajton preferi apartan religian pozicion kaj devigatas montri neŭtralecon, toleremon kaj pluralecon, tamen postulas subtenon de aparta religio, unuflanke malpermesante kaptukon kiel „religian signon” de islamo, aliflanke postulante krucifikson kiel religian signon por ĉiuj.

Juristoj argumentas, ke la ŝtato ne rajtas malpermesi religion al siaj oficistoj, aliflanke ne devas resti tute indifera kontraŭ ajna mondkoncepto aŭ religio, ekzemple kontraŭdemokratia aŭ kontraŭŝtata, sed neniel rajtas preferi aŭ ĝeni religion.

Libereco

La ŝtato devus protekti civitanojn, precipe infanojn, kontraŭ influo

de iu aparta religio sen ebleco de evito aŭ retiriĝo. Tiu maksimumo estu obeata des pli rigore en ŝtataj lernejoj. La kristana kruco aŭ krucifikso estas simbolo de aparta religio. Ankaŭ por infanoj validas la rajto de religia libereco. Per deviga kruco en klasĉambroj la ŝtato difektas ĉi tiun rajton kaj ankaŭ tiun de la gepatroj religie eduki siajn infanojn.

La Bavara Konstitucia Kortumo verdiktis, ke tia malneŭtraleco ne rompas leĝon, se ekzistas ebleco reguligi konfliktojn. Kaj tian regulon la ministro aldonis al la dekreto. Se ekzemple gepatroj aŭ instruistoj laŭjure plendas pri krucifikso en klasĉambro, oni eligu la krucon el tiu unuopa klasĉambro dum la ĉeesto de la koncernaj personoj.

Etiko

Nun la Verdula Partio postulas samtraktadon de ĉiuj religioj, ankaŭ minoritataj, per ĝenerala forigo de ĉiuj ajn religiaj simboloj el lernejoj en Bavario. Tuj la kristansocia ministro pri kulturo Siegfried Schneider [zigfrid ŝnajder] akre reagis, respondante, ke krucoj restu en lernejoj, ĉar ili estas gravaj simboloj por kristana etiko. Krucifiksoj estas parto de kulturo kaj identeco en Bavario, li diris. Riproĉis la jam de jardekoj reganta Kristansocia Partio, ke la postulo de la verduloj kaŭzas maltoleremon, malliberecon kaj religian malpacon.

La verduloj reage argumentis, ke ŝtato estas devige tolerema kaj pluraleca. La frakciestrino Margarete Bause [baŭze] diris: „Se kaptuko malpermesatas, ankaŭ uniformo de monaĥino devas esti malpermesata.”

Vere ŝtato ne havas la taskon instigi homojn al religieco aŭ deteni iun de ĝi. Ĉefa tasko de lernejoj estu plifortigi solidarecon kaj integriĝon per valoroj etike neŭtralaj en senco de homrajtoj. Egalrajteco de ĉiuj religioj povus konsekvenci postulon de rajto montri religiajn konvinkojn per simboloj individue (per kaptuko, kruca ĉeno k.s.) kaj samtempe sindetenon de la ŝtato. Kontraŭa postulo estas malpermeso de ĉiuj religiaj simboloj kaj agoj en ŝtataj lernejoj.

Jomo IPFELKOFER



MANGAĴOJ

Ku(kur)bo!

Mi legis la artikolon *La kukurbo, frukto multvizaĝa* (MONATO 2008/3, p. 14-15) kaj naskiĝis en mia kapo la ideo skribi pri la diversaj uzoj de tiu legomo en mia lando.

En Kubo oni semas kukurbon dum majo kaj eblas aĉeti ĝin dum la tuta jaro en agrobazaroj. Sed ankoraŭ regas la penso, ke kukurbo estas manĝaĵo por bestoj kaj malriĉuloj, malgraŭ tio, ke tiu ĉi opinio nuntempe ne multe validas rilate malriĉulojn, ĉar



la prezo fariĝis pli kaj pli alta.

Kiel kuirheredaĵo de niaj avinoj ni konas diversajn bongustajn pladojn faritajn el kukurbo. Kelkaj el ili estas: kukurba flaŭno (foto 1), rostita kukurbo (foto 2), fromaĝa kremo kun kukurbo (foto 3), kukurba salato (foto 4), kaj krome eblas aldoni ĝin al diversaj supoj (foto 5). En vegetaranaj restoracioj oni proponas ĝin nekuirita.



Kuracilo

Sed ni uzas ĝin ne nur kiel nutraĵon, sed ankaŭ kiel naturan kuracilon, kaj en tio utilas ĉiuj partoj de tiu legomo. La semoj (foto 6) estas uzataj por: forigo de parazitaj. Antaŭ ol matenmanĝi engluti du kulerojn da pulverigitaj sekaj semoj.



Oni povas manĝi tion kun aŭ sen sukero; malŝveliĝo de la prostato; manĝu la semojn; Cetere la karnon oni uzas kaze de intesta irito: kirlu litron da akvo kun du kuleroj da kuirita kukurba karno; trinku la sukron plurfoje en la tago; sur bruligita haŭto: apliku kuiritan kukurban karnon en formo de kremo por hidratigi la haŭton; la floroj estas uzataj kaze de foto 7; konjunktivito: metu la florojn en bolantan akvon kaj kuiru ilin dum kelkaj minutoj; post malvarmiĝo apliku la likvaĵon al la okuloj.



Legendoj

Ĉar kukurbo estas pratempa, estiĝis legendoj pri ĝi. Ekzemple, en mia naskiĝurbo Las Tunas (en la orienta regiono de Kubo), estas bela akvofonto, kiu bildigas legendon pri aborigena

vilaĝeto. Tie la tagoj pace pasis kaj la aborigenoj feliĉis, ĉar mankis malsato kaj milito. Iam la plej maljuna viro de la tribo donacis al sia filino kukurbon kaj petis, ke ŝi ĝin tre atente zorgu.

La junulino plenumis kun plezuro sian devon dum multaj lunalvenoj. Sed malaperis la trankvilaj tagoj, kaj vualis la vilaĝeton malĝojo. Iun tagon la filino de la maljunulo promenis inter la arboj. Ŝi kunportis la kukurbon, ĉar ŝi devis ĝin ĉiumomente prizorgi. Tamen ŝi tiom koncentriĝis pri la penso kiel liberigi siajn fratojn de malsato kaj malĝojo, ke ŝi preskaŭ ne rigardis, kien ŝi metis la piedojn.

Ŝi stumblis kaj falis surteren kaj kun ŝi la kukurbo, kiu rapide dispeciĝis. La junulino malĝojiĝis kaj larmoj aperis en siaj belaj okuloj, sed granda miraklo okazis: de la interno de la kukurbo komencis eliri akvo kaj poste fiŝoj senhalte. La kukurbo estis magia kaj tiel la feliĉo revenis al la vilaĝeto.

Ŝercoj

Ekzistas ankaŭ ŝercoj, en kiuj rolas kukurboj. Ekzemple, viro estas invitita por la unua fojo manĝi kukurbon, sed neniuj klarigis, ke ĝi estas ĵus kuirita kaj kompreneble varmega. La viro metas grandan kukurbopecon en sian buŝon kaj krias pro la lango-bruliĝo.

Post kelkaj tagoj li promenas apud rivero kaj vidas flosantan kukurbon. Li rigardas la kukurbon kun malamo kaj diras: „Vidu, ĝi venas tiel freŝa, tamen kun varmega animo”.

Abundas ankaŭ popolaj kredoj kaj diroj. En mia junaĝo mi tute ne ŝatis manĝi kukurbon kaj mia patrino avo, gaja kaj sprita kamparano, konsilis: „Manĝu kukurbon, ĉar ĝi estas bona por la okuloj”. Kompreneble mi dubis pri tiu aserto, sed mia avo min demandis: „Ĉu iam vi vidis porkon kun okulvitroj?” Post mia nea respondo li diris: „Ha, ĉu vi vidas? Mi pravas!”.

Filmeto

Ĉiutage en Kubo, je la 8a posttagmezo, oni dissendas per televido mallongan



filmeton, kie ĉefrolas pupino (foto 8) nomata La Kukurbeto. La celo de tiu filmeto estas anonci, ke la porinfana programo finiĝis kaj la tre junaj infanoj devas iri dormi. La tenera kukurbeto kunportas kapkusenon, per kiu ĝi povas flugi kaj viziti ĉiujn infanojn por diri al ili: „Ĝis morgaŭ”.



Oscar Fernández Morera, konata pentristo el Sancti Spiritus, dediĉis sin



al pentrado de floroj kaj fruktoj. Inter liaj pentraĵoj estas unu (foto 9), en kie aperas kukurbo. Lia naskiĝdomo estas nuntempe artgalerio lokita en la centro de la urbo.



Krom legendoj kaj ŝercoj, vere estas, ke en Kubo abundas kukurboj, kiuj kutime akompanas la manĝojn de multaj. Tamen informoj pri kukurboj en Kubo ne facile haveblas. Ŝajnas, ke la ĉefaj specioj venis de Azio. En 1896, dum urba enfermo-premado, la mambioj (kubaj kamparaj batalantoj dum la hispana regado en Kubo) manĝis nur maizon, fazeolojn kaj kukurbojn.

Yoandra Isabel RODRÍGUEZ LABRADA



Manĝi estos pli koste

Dum jardekoj en Eŭropo kaj Usono estis produktataj tro multe da nutraĵoj. Malgraŭ la troo la prezoj ofte estis super la nivelo de la monda merkato, sed ili estis stabilaj kaj ne prenis tro grandan parton de familia buĝeto. Nun la stokegoj malaperis kaj la nutraĵprezoj rapide kreskis je pluraj, en triamondaj landoj eĉ je plurdekaj procentoj.

Eraroj finfine forigitaj

Kiam post la dua mondmilito ekestis la planoj por eŭropa ekonomia unuiĝo, unu el la celoj estis, post jarcento kun pluraj militoj kaj periodoj de malsato, garantii sufiĉan lokan produktadon de nutraĵoj. Tio iĝis samtempe la plej sukcesa kaj la plej kritikata realigo de la Eŭropa Unio (EU). La agrikulturo iĝis pli moderna kaj pli grand skala kaj pro la garantiitaj prezoj la agrikulturistoj havis stabilajn enspezojn. Por la konsumantoj neniam estis manko de manĝaĵoj, sed tiuj kiuj kapablis vojaĝi tamen miris, ĉar ekster Eŭropo viando aŭ lakto ofte kostis malpli. La garantiitaj prezoj instigis la agrikulturistojn produkti pli ol bezonate kaj la troo estis je granda kosto longdaŭre stokita aŭ kun grandaj subvencioj vendata en la monda merkato, kie la prez nivelo estis ĝenerale multe malpli alta. Kritiko venis ne nur pro la altaj kostoj de la sistemo aŭ ĉar ĝi perturbis la internacian merkaton, sed ankaŭ ĉar la malpli efike laborantaj agrikulturistoj en evolulandoj ne plu eltenis la konkurencon de la subvenciataj – aŭ en periodoj de malsato eĉ senpagaj – importitaj varoj.


Kun multe da peno EU dum la pasinta jardeko sukcesis redukti la produktadon kaj forigi la stokojn. Krome,

pro kelkaj skandaloj rilate al la kvalito kaj pro bestaj malsanoj, la prezoj falis (aŭ almenaŭ ne altiĝis) ĝis nivelo kiun la agrikulturistoj apenaŭ povis elteni. Tial ili ĝojis kiam antaŭ unu jaro ekestis kelkfoje manko de greno kaj lakto kaj la prezoj altiĝis.

Plurkialaj prezaltiĝoj

La malpli granda produktado en Eŭropo estas nur unu klarigo de la altiĝanta prez nivelo de nutraĵoj. Samtempe okazas la senĉese ŝrumpanta agrikultura areo pro urbiĝo kaj industriiĝo, okazas la longdaŭraj internaj militoj, kiuj malhelpas produktadon en multaj landoj, estas malbonaj rikoltoj en iuj regionoj kaj fine kreskas en pluraj landoj la vivnivelo, unuavice en Ĉinio, kies loĝantoj postulas pli abundajn kaj pli kvalitajn manĝaĵojn.

Normale la restantaj stokoj kaj efika distribu-sistemo sufiĉus por (almenaŭ dum kelkaj jaroj) ekvilibrigi lokajn mankojn de nutraĵoj, sed nun estas plia faktoro: la biokarburaĵoj (MONATO, 2007/12). Laŭ strikta temposkemo en Usono kaj Eŭropo estu aldonata procentaĵo da biokarburaĵoj al la normalaj karburaĵoj por aŭtomobiloj. Tial la demando je plantoj por produkti biokarburaĵojn rapide kreskis kaj mul-



FRANÇOIS ROCHE

taj agrikulturistoj komencis kultivi tiajn plantojn anstataŭ kutimajn manĝaĵojn. Kelkaj plantoj, kiuj taŭgas por ambaŭ celoj, kiel maizo, akiras pli interesajn prezojn en la merkato de biokarburaĵoj kaj sekve mankas en la nutraĵmerkato.

Ne tuj venos korekto

Dum antaŭ kelkaj jaroj neniu dubis pri la utilo de biokarburaĵoj, oni nun ĝenerale konsentas ke ili apenaŭ efikas kontraŭ la klimatsanĝiĝo, ĉar ilia produktado postulas tro da energio. Foje la rendimento eĉ estas negativa. Jean Ziegler, konata kritikanto de la EU-politiko, meze de aprilo 2008 deklaris ke la produktado de biokarburaĵoj estas „krimo kontraŭ la homaro”, pro ĝia efiko je mondaj nutraĵprezoj. Laŭ Paul Collins de la universitato de Oxford, por pleniĝi benzinojn de granda aŭtomobilo per biokarburaĵoj estas bezonata kvanto da greno, per kiu afrika familio povas vivteni sin dum unu jaro. Tamen, la Eŭropa Komisiono ĝis nun rifuzas revizii sian starpunkton, kaj ankaŭ je landa nivelo la registaroj konfirmas la iamajn decidojn. Oni atendas tiel nomatan „duan generacion” de biokarburaĵoj kies produktado estus pli racia.

La sinteno de la Komisiono plian fojon konfuzas la civitanojn. En gazeta-

ro kaj televido ili estas daŭre instigitaj konsumi malpli da energio, foje per metodoj ridigaj aŭ nerealismaj. Samtempe, en apuda gazeta paĝo aŭ en sekva televida programo aŭ reklamo, sen iu kritika rimarko, oni montras al ili domegojn aŭ energivorajn aparatajn kvazaŭ ne ekzistis iu energi- aŭ klimat-problemo. Vane energikonsciaj homoj atendas simplajn intervenojn, kiel eŭroponivelan rapideclimigon je aŭtovojoj aŭ drasta malstimulo de aĉeto de malŝparemaj aŭtomobiloj. Tiaj registaraj decidoj povus tuj havigi realan malpliigon de la energikonsumo je pluraj procentoj. Energifakturoj (almenaŭ en Belgio) iĝis tiel komplikaj ke averaĝa konsumanto ne plu sukcesas eltrovi kiom kostas unu unuo de gaso aŭ elektro. Oni do ne miru ke la homoj laciĝas vidante kaj aŭdante la multajn „konsilojn”.

Kio okazu?

Urgas serioze konsideri la argumentojn de fakuloj, kiuj asertas ke la nuna uzo de biokarburajoj pli malutilas ol utilas. Ankaŭ ĉesu la malamikaj



La produktado de biokarburajoj estas „krimo kontraŭ la homaro”, pro ĝia efiko je mondaj nutraĵprezoj.

rilatoj inter naturprotektantoj kaj agrikulturistoj, kiu nun foje havas surrealismajn efikojn. Oni ne plu rajtas ĉasi birdojn, sed kontraŭe toleru, ke ili amasiĝas kaj formanĝas rikoltojn. La agrikultura areo daŭre malgrandiĝas, ne nur pro industrio kaj domkonstruo, sed ankaŭ pro senĉesa pligrandigo de naturaj zonoj, neuzeblaj por iu ajn produktado. Tamen, bone mastrumata agrikulturo ankaŭ estas naturo. Ĝenerale, la registaroj havu koheran kaj kredindan politikon rilate al natura medio.

Ĉar la monda loĝantaro kaj ĝiaj postuloj je nutraĵoj pli rapide kreskos, ol

la malgranda kvanto da riĉaj mondanoj povas kompensi konsumante malpli, nepre necesas altigi la produktadon de manĝaĵoj per novaj produktometodoj. Plej promesplenaj sed ankaŭ plej riskaj estas la transgenaj plantoj. Tiurilate eŭropaj registaroj estas multe pli prudentaj ol amerikaj.

Daŭre necesos internacia komerco kaj transporto de nutraĵoj, sed necesas pli bone reguligi ĝin por ke ne bankrotu la agrikulturistoj, kiuj devas labori en malfavoraj cirkonstancoj pro konkurenco de pli efikaj kaj malpli kostaj alilandaj produktoj, lasante sian landon sen propra produktado.

Spekulantoj malkovris la nutraĵmerkatojn

Pro la daŭranta tutmonda kreditkrizo kelkaj kutimaj investobjektoj de spekulantoj iĝis malpli allogaj. En la nutraĵmerkato jam ĉiam okazis multe da spekuladaj transakcioj, sed ili kutime estis farataj de fakuloj kaj ne nepre havis fiajn efikojn. Nun kelkajn nutraĵmerkatojn inundas eksteraj spekulantoj, kiuj per multe da mono esperas atingi rapidajn gajnojn. Ili kaŭzas grandegajn prezfluktuojn, supren kaj malsupren, kiuj ne tuj influas la kvanton de disponeblaj agrikulturaj produktoj, sed ege negative influas la fidon kaj la planadon de la produktantoj. Same kiel en financaj merkatoj, ankaŭ en nutraĵmerkatoj estas bezonataj reguloj por limigi la ekscesojn de la spekulado.

Roland ROTSAERT



Laŭ Paul Collins de la universitato de Oxford, por plenigi benzinojn de granda aŭtomobilo per biokarburajoj estas bezonata kvanto da greno, per kiu afrika familio povas vivteni sin dum unu jaro.

ĈINIO

Rafinejo jubileas

La petrola rafinejo *Fushun Numero 1* estis fondita en la jaro 1928. Ĝi estis la unua rafinejo de artefarita oleo kaj unu el la plej fruaj petrolaj rafinejoj en Ĉinio. De 1928 ĝis nun ĝi trapasis neordinarajn vojojn de evoluo: konstruado de la rafinejo en la 1930aj jaroj, restarigo en la 1950aj jaroj, reformado en la 1970aj jaroj, grandiĝo en la 1990aj jaroj kaj plua renovigo en la nuna jarcento. Ĝi grave kontribuis al la evoluo de la ŝtata ekonomio.

La rafinejon konstruis la japana armeo invadinte Ĉinion. Tiam ĝi prilaboris skiston por produkti skistan oleon, nomatan ankaŭ artefarita oleo. La kvanto de prilaborita skisto atingis 4000 tunojn tage. La produktopaŝoj ĉefe konsistis el dispecigo de la skisto, kribrado, seka distilado, eltiro de gudro, distilado de kruda oleo kaj distilado de kruda vakso. La rafinejo estis grave damaĝita dum la regado de Kuomintang kaj povis esti

restarigita nur post la liberigo de Fushun en novembro 1948.

Ekde 1961, post kiam en 1960 oni trovis petrolokampon Daqing [daĉing], la rafinejo komencis prilabori ĝian petrolon kun alta enhavo de vakso (25 %). De tiu tempo ĝis la jaro 1987 ĝi traktis kaj skistan oleon kaj Daqing-petrolon. Pro kostaltiĝo kaj malnoviĝo de la ekipaĵoj oni en 1987 ĉesigis la produktadon de skista oleo. Dume estis sukcese kons-

truitaj la unua aparato de Ĉinio por vaksa splitiĝo por sinteza lubrika oleo en 1970 kaj kataliza splitiĝa aparato en 1987. Tiam la prilabora kapablo de petrolo estis 2 milionoj da tunoj jare. Ankoraŭ en 1987 la rafinejo ekprilaboris, krom Daqing-petrolon, petrolon el Shenyang [ŝenjang] kun pli alta enhavo de vakso (42 %). Oni konstruis novan produktan areon en 1997. La prilabora kapablo siatempe atingis 4 milionojn da tunoj jare. Estis instalitaj novaj aparatoj, ekzemple por ketono-toluena sen-vaksigilo kaj sen-oleigilo, hidrogenado sub alta premo, grajnigo de parafina vakso, ktp. Tiuj aparatoj estas la bazo por transformi la rafinaĵon el brulaĵo al parafina vakso kaj lubrika oleo. Nun ĝi jam estas la plej granda produkta kaj eksporta unuo de parafina vakso en Ĉinio.

Lastatempa evoluo

La petrola rafinejo *Fushun Numero 1* dum sia 80-jara ekzisto trapasis sortoŝanĝojn neordinarajn. Ĝia historio estas ankaŭ la historio de la nuna Fushun Petrokemia Kompanio. La nuna projekto „kunproduktado de parafina vakso kaj lubrika oleo”, celas dum la dek-unua kvinjara plano (2006-2010) atingi produktajn kvantojn de parafina vakso kaj lubrika oleo de respektive 0,6 milionoj kaj 0,5 milionoj da tunoj jare. Ĝi iĝos grava je monda skalo, interalie pro la 50 000 tunoj da specialaj vaksajoj jare.

Wu Guojiang



La produktareo konstruita ekde 1997.

Asocia kaj volontula laboroj ekonomie gravas

En nia socio multe da taskoj – ekzemple la eldono de ĉi tiu revuo – estas plenumataj de asocioj kaj voluntuloj. Kvankam tia laboro ja havas iun valoron, ĝis nun tute mankis fidindaj ciferoj. Je la 9a de majo 2008 en Bruselo okazis studotago, dum kiu la unuaj rezultoj de nova registradmetodo estis prezentitaj.

La „Fonduso Reĝo Baldueno” (FRB) estis fondita en 1976, okaze de la 25-jara jubileo de Baldueno la 1-a, la tiama reĝo de Belgio. Li petis ke oni ne havigu al li donacojn, sed ke anstataŭe oni kreu fonduson, kiu kontribuu al pli harmonia socio. Ekde tiam, FRB ludas daŭre pli grandan rolon en la stimulo de diversgrandaj asocioj en Belgio. Iom post iom ĝi ankaŭ internacie aktivas kaj ĝuas prestiĝon, interalie pro ĝia scienca laboro pri tiu sektoro. Unu tia scienca projekto estas la kalkulo de la ekonomia valoro de la agado de asocioj kaj voluntuloj. Por tio ĝi kunlaboris kun profesoro Lester M. Salamon de la Centro pri Civitanaj Studoj de la usona

universitato *Johns Hopkins University* (JHU).

En ĉiu lando, la centra banko aŭ simila instanco okupiĝas pri la „naciaj kontoj”, kies fina rezulto estas la „malneta enlanda produkto”, la tuto de varoj kaj servoj kiujn lando produktis dum difinita periodo. La kalkulado okazas laŭ metodo preskribita de Unuiĝintaj Nacioj, sed la ciferoj de asocioj ĝis nun estas nur parte registritaj kaj la volontula laboro – esence nepagata – tute ne. JHU verkis aldonan manlibron por unuece fari tion. Kelkaj landoj jam uzis ĝin farante siajn kontojn kaj nun sufiĉe da ciferoj estas disponeblaj por unuafaje prezenti ilin al la publiko.

Kunmeti kaj interpreti la ciferojn ne estas facila afero, ĉar en ĉiu lando la situacio malsamas. Ekzemple en Belgio pri instruado kaj sanzorgo grandparte okupiĝas asocioj, dum en aliaj landoj tiuj taskoj povas esti komplete prizorgataj de la ŝtato, aŭ kontraŭe grandparte lasitaj al la komerca sektoro. Oni do estu singarda komparante la ciferojn. Tamen, estas klare ke la asocia sektoro, inkluzive de la volontula laboro, ĉie estas proksimume same granda kiel la sektoroj de konstruado aŭ de financaj servoj: po proksimume 5 % de la malneta enlanda produkto.

www.kbs-frb.be, www.jhu.edu/ccss

Roland ROTSAERT

	Mez-umo	AU 1999	BE 2001	CA 2000	CZ 2004	FR 2002	JP 2004	NZ 2004	US 2003 2003
Asocioj, inkl. de voluntuloj	5,0	4,7	5,0	7,3	1,3	4,2	5,2	4,9	7,2
Elektro, gaso, akvo	2,4	2,3	2,2	2,7	3,4	1,5	2,5	2,7	2,0
Konstruado	5,1	6,1	4,4	4,6	5,8	4,7	6,5	4,6	4,4
Financa perado	5,6	6,3	5,0	5,5	3,1	4,2	6,7	6,2	7,7
Transporto kaj komuni- kado	7,0	7,7	7,1	6,4	9,6	5,7	6,8	7,0	5,9

Kontribuo de asocioj al la malneta enlanda produkto, kompare kun aliaj industrioj, laŭ lando, en %.

FINNLANDO

Lerto admirenda



SALIKO

Vintra vidaĵo.

La subĉiela metiista muzeo en Turku ekspozicias instrumentojn kaj prezentas la vivkondiĉojn de kvardeko da metiistoj el la 18a kaj 19a jarcentoj. Enkadre de ĝi sindona grupo de lertuloj strebas, ke oni daŭre posedu la sciojn kaj lerton de niaj antaŭuloj. Ili montras kiel oni faru permane gantojn, kuprajn kafopotojn, cigaredojn, ŝnurojn, presaĵojn, korbojn, ornamaĵojn el homaj haroj kaj aliajn objektojn, kiujn oni nun produktas en fabrikoj aŭ kiuj nun estas apenaŭ konataj. La muzeo estas unu el la urbaj fieraĵoj. La Provinca Muzeo de Turku jam eldonis pri ĝi kaj ties historio libreton kun koloraj bildoj.

En la mezepoko la parcelo, kie nun metiista muzeo troviĝas, supozeble estis uzata kiel tombejo de la monaĥejo de Sankta Olavo. La loknomo *Luostarinmäki* signifas „monaĥeja altaĵeto”. Estas tamen mirakle, ke la lignaj domegoj de metiistoj ‘transvivis’ la teruran incendion, kiu forbruligis tri kvaronojn de la urbo Turku en 1827. Poste oni ne plu permesis, ke oni loĝu en ili pro danĝero de eventuala posta incendio. La domegoj tamen ne estis detruitaj. En la 20a jarcento ekestis la ideo estigi subĉielan muzeon de metiistoj. Ĝi estis realigita



SALIKO

Belaj balustradoj ankaŭ en modestaj domoj.

kaj oni inaŭguris ĝin en 1940.

La metiista muzeo estas malfermita tutjare. En ĝi oni povas ekkoni la vivkondiĉojn, meblojn, lumigadon, hejtadon, kuiradon kaj laborilojn de la pasinteco. Multaj metiistoj en historie aŭtentikaj vestoj demonstras sian arton somere kaj dum specialaj tagoj aŭtune, kiam venas lertuloj ankaŭ el aliaj landoj



SALIKO

Domegoj de la 18a kaj 19a jarcentoj.

por uzi la malnovajn instrumentojn, kiuj por la hodiaŭa homo enigmas. Kristnasko okazas ekspozicioj pri la tradicioj antaŭ 100-200 jaroj kaj kantado de malnovaj kristnaskaj kantoj. Al la muzeo oni aljuĝis la premion „Ora Pomo” pro ĝia kulturhistoria kaj turisma valoro.

SALIKO

Islanda historia romano

Sagao de Njal apartenas al la t.n. *Islandanaj Sagaoj*, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 11-a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn.

Sagao de Njal estas la plej granda kaj artisma el la sagaoj. Malgraŭ vasta personaro kaj komplika eventaro ĝi formas arte kunplektitan tutajon; oni havas la impreson, ke ĝia aŭtoro havis enmense ĝian lastan vorton jam en la komenca ĉapitro. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis la definitiva solviĝo en la fino.

Personecoj atestas pri si mem per vortoj kaj faroj, neniam estas dirite, kion ili pensas.

La sagao estas tradukita jam en multajn lingvojn. Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj en 2002 *Sagao de Njal* estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda fikcia literaturo.



Paĝoj: 357; ilustrita; 21 cm; kudre bindita; 2003;

Prezo: € 18,00


Informoj:

tel. +32 3 234 34 00;

tel. +32 3 233 54 33;

rete: butikofel.esperanto.be

<http://retbutikofel.esperanto.be>

Furoro de 

lingvo

REAGO

Manko de bonaj instruistoj?

Geraldo Mattos, la iama prezidanto de la Akademio de Esperanto, traktas en tripaĝa artikolo (MONATO 2008/6, p. 19-21) precipe la malkoheran uzadon de la participoj en Esperanto. Sed mi asertas, ke samteman artikolon mian oni rifuzus per la argumento: „Ni ne traktas pri-esperantajn temojn en nia gazeto.” Tamen mi tre bonvenigas la artikolon kaj ĝian aperigon en MONATO kaj esperas, ke multaj esperantistoj legis la lastan tabelan alineon, listigantan la simplan temporilatan reciprokan uzon de la aktiva same kiel la pasiva participo en la tri tempoŝtupoj.

La pledon de la akademiano Mattos, ke ne la ordinaraĵoj esperantistoj kulpas pri siaj eraroj, sed la manko de bona instruo kaj bonaj reguloj, mi nur povas komenti same kiel similan de Rudolf Fischer en *Esperanto aktuell*. Ambaŭ aŭtoroj provas klarigi, ke Esperanto sekvu ne nacilingvajn kutimojn, sed la logikon de Zamenhofa montritan. Mi aldonas, ke la problemoj ne estus, se la esperantistoj sincere estus okupiĝintaj pri la verkoj de Rikardo Ŝulco. Tie troviĝas multaloke la reguloj konsekvence eltiritaj el la zamenhofa kodo, kiuj solvas la aspektisman haoson, kion nun ankaŭ Fischer kaj Mattos por si mem eltrovis.

Kiom da perdita tempo, da nenecesa laboro, da nescio pro la fakto, ke la oficiala Esperantujo la seriozajn, sciencajn esplorojn de Ludoviko Mimoo kaj Rikardo Ŝulco orgojle kaj stulte ignoris. Ŝulco jam antaŭ dudek jaroj prezentis similan liston kiel aktuale Mattos. Kaj lia regulo estis eĉ pli simpla: „La participo rilatas al la priparolata tempo”.

Bonaj instruistoj kaj bonaj reguloj (kaj tio devas signifi: sciencaj reguloj, ne nur „komfortaj” nacilingvaj paŝaĵoj) ja ekzistas. Eble mankas bonvolaj lernantoj.

Cetere, nun ankaŭ MONATO certe „fermas la debaton”, kiel faris *Esperanto aktuell* post mia argumentado ...

Franz-Georg RÖSSLER
Germanio

Batalo kontraŭ mortiga malsano

Rabio estas unu el la plej antikvaj malsanoj konataj al la homaro. Ĝi estis menciita en antikvaj medicinaj traktaĵoj de Mezopotamio, Ĉinio, Hindio, kaj Egiptio. Priskribon de tiu mortiga malsano entenas ankaŭ la monde konata egipta papiruso, la tiel nomata papiruso de Ebers, kiu estas konsiderata kiel antikva egipta medicina enciklopedio, kompilita antaŭ 3550 jaroj. Rabio estis bone konata al filozofoj kaj kuracistoj de antikvaj Grekio kaj Romo, kiuj prave kunligis la malsanon kun la mordo de rabiaj bestoj. Sentante teruron antaŭ la mortiga malsano, la homoj, morditaj de rabiaj hundoj, ne nur uzis infuzaĵojn de diversaj herboj kaj baniĝis en la sanktaj akvujoj, sed eĉ bruligis aŭ eltranĉis la mordlokon. Sed ĉio estis senutila. Malsaniĝis ĉiu tria mordita de rabia besto, sed post multenombraj aŭ pli danĝeraj mordoj, ekzemple en kapo, preskaŭ ĉiuj mortis.



MAYU P

Sed nur post 5 jaroj da seninterrompaj esploroj, en 1885, estis akirita la unua vakcino, kiu savis la vivon de knabo mordita de rabia hundo

Louis Pasteur, savinto de milionoj

Nur post la eltrovo de Pasteur de kontraŭrabia vakcinado aperis la ebleco savi homojn morditajn de rabia besto. En 1880, kiam Pasteur kun siaj kunlaborantoj Émile Roux kaj Charles Chamberland komencis esplorojn pri rabio, li estis preskaŭ sesdekjara. Tiam ne estis eĉ proksimume konata infekta agento, kaŭzanta rabion, ĉar virusoj estis malkovritaj nur en 1892. Sed tio ne haltigis la scienciston. Krom geniece, Pasteur posedis eksterordinaran kuraĝon, ĉar li konstante riskis sian vivon, kiam li forprenis salivon el la buŝego de rabia hundo por eksperimenta infektado de kunikloj. Sed nur post 5 jaroj da seninterrompaj esploroj, en 1885, estis akirita la unua vakcino, kiu savis la vivon de knabo mordita de rabia hundo. La vakcino posedis rimarkindan proprajon: ĝi sekvigis la kreadon de antikorpoj, kiuj plejparte neniigis la virusojn de rabio ankoraŭ en la inkubacia (latenta) stadio de la malsano. La vakcino de Pasteur savis milionojn de terura morto. La vakcino stamo de viruso akirita de Pasteur ĝis nun estas utiligata por krei modernajn, pli perfektajn vakcinojn. La plej granda suplemento al kontraŭrabia vakcino estis eltrovo kaj akirado en la 20-a jarcento de specifa kontraŭrabia imunoglobulino (proteinoj de sango, kiuj plenumas funkcion de antikorpoj). Imunoglobulino entenas pretajn antikorpojn, kapablajn neŭtraliigi la viruson de rabio dum la mallonga inkubacia periodo, kiam en la organismo ankoraŭ ne sukcesas formiĝi postvakcinaj antikorpoj.

Tragedioj ne malaperis

Nuntempe, malgraŭ tio, ke ekzistas sufiĉe fidindaj rimedoj por preventado

de rabio, ĉiujare en la mondo, laŭ informo de la Monda Organizo pri Sano, malsaniĝas kaj pereas de rabio pli ol 50 miloj da homoj. La plejparto el ili estas loĝantoj de Afriko, Azio kaj Latina Ameriko. La plimulto de la malsaniĝintaj ne turnis sin al medicinistoj post la mordo de rabiaj aŭ nekonataj hundoj, aŭ faris tion tro malfrue, kiam en la organismo ne sukcesis formiĝi postvakcinaj antikorpoj. En iuj kazoj medicinistoj faris seriozajn erarojn, ekzemple aplikante por preventado de rabio nur vakcinon kaj ne uzante la specifan imunoglobulinon malgraŭ tio, ke la viktimoj havis multenombrajn mordojn aŭ mordojn de la plej danĝeraj lokoj, nome, la kapo, vizaĝo, kolo, manfingroj kaj aliaj. En tiuj kazoj la simptomoj de malsano ofte aperas post mallonga inkubacia periodo. Tial estis necese uzi krom vakcino ankaŭ specifan imunoglobulinon, entenantan la pretajn antikorpojn.

Dum mordado, la viruso de rabio el la salivo atakas la vundon kaj reproduktiĝas en la dermo kaj muskoloj. Iom poste, la viruso antaŭenmoviĝas laŭ nervaj fibroj en la cerbon, kie ĝi frapas la sensajn kaj movajn centrojn de la kortiko kaj same la cerebelon kaj multajn subkortikajn zonojn. La inkubacia (latenta) periodo de rabio varias de 7-10 tagoj ĝis kelkaj monatoj aŭ pli. La unuaj simptomoj de la malsano estas doloro aŭ, kontraŭe, perdo de sento en la mordloko, kaj ankaŭ kapdoloro, incitigemo, vomo kaj aliaj. Baldaŭ aperas la tipa, tre turmenta, simptomo: akvotimego (tial rabio ankoraŭ nomiĝas hidrofobio), kiam ĉe la malsanulo dum iu provo eltrinki eĉ unu guton de akvo, aperas konvulsiaj kunstreĉigoj de faringo-muskoloj. Aliĝas paralizo, konvulsioj,



TSCHORDA



DISSOLVED

halucinaĵoj, kaj post 3-5 tagoj preskaŭ ĉiu malsanulo pereas. La kuracado precipe celas plifaciligi ĝismortajn suferojn de la malsanulo. Necesas enloki la malsanulon en apartan izolitan ĉambron. Oni aplikas narkotaĵojn, dormigilojn, kontraŭkonvulsiajn kaj aliajn medikamentojn.

Espero mortas la lasta

Ĝis nun rabio estas konsiderata kiel mortiga malsano. En 2004 la unuan fojon resaniĝis 15-jara malsanulino, ĉe kiu aperis simptomoj de rabio, unu monaton post kiam ŝi estis mordita de vesperto. Ŝi ne estis vakcinita kontraŭ rabio post la mordo. Ŝajne, la morto de la malsanulino estis antaŭdecidita. Sed iu kuracisto pri infektaj malsanoj en malsanulejo de la urbo Milwaukee (ŝtato Wisconsin, Usono), Rodney Willoughby, ne perdis esperon savi la junulinon. Subgvide de doktoro Willoughby, kuracistoj unue aplikis novan kompleksan metodon de resanigo. Tiucele, la malsanulino estis enigita kunhelpe de diversaj anesteziiloj en komatan staton, kiu daŭris unu semajnon. Kuracistoj kvazaŭ „malsaltis” la cerbon de la malsanulino. Verŝajne tio

kondukis al malaltigo de virusa aktiveco en la cerbo. Krome la malsanulino ricevis kontraŭvirusajn medikamentojn. Post unu semajno, en la organismo de la malsanulino estis produktitaj propraj kontraŭrabiaj antikorpoj, kiuj, verŝajne, neŭtraligis la viruson de rabio. Sed por la plena resaniĝo de la junulino estis necesaj preskaŭ tri monatoj.

Bedaŭrinde, ĉiuj pluaj provoj resanigi aliajn malsanulojn de rabio per la metodo de doktoro Willoughby restas senrezultaj. Tial, apartaj kuracistoj rilatas al tiu metodo kun malkonfido, kaj parolas pri iu feliĉa koincido. Sed ankaŭ estas eble, ke resaniĝo de la malsanulino ne estis koincido. La metodo de doktoro Willoughby estis sufiĉe motivita. Necesas plu analizi kaj perfektigi ĝin. Kvankam kuracistoj subgvide de doktoro Willoughby savis la vivon nur de unu malsanulino de rabio, tamen, kiel estas dirite en la Biblio, „kiu savas nur unu vivon, tiu savas la tutan mondon”.

Ĉefaj restas preventaj rimedoj

Do, rabio ĝis nun estas nekuracebla malsano, kaj ĉefe restas preventaj rimedoj. La virusportantoj de rabio estas

karnovoraj bestoj. En sovaĝa naturo tiuj estas vulpoj, lupoj, ŝakaloj, procionoj, skunkoj, vespertoj kaj aliaj. En loĝlokoj la fontoj de rabio precipe estas hundoj, kaj malpli ofte katoj. En suda kaj centra Ameriko la plej gravan rolon en disvastiĝo de rabio havas sangosuĉantaj vespertoj, kiuj sin nutras per sango de mambestoj kaj infektas ilin je rabio. Ili malĝuste nomiĝas vampiroj, kvankam biologie vampiroj estas aliaj, ne sangosuĉantaj vespertoj.

Portantoj de la viruso de rabio same povas esti ankaŭ insektomanĝantaj vespertoj. Vespertoj prezentas la plej grandan danĝeron en transmisio de rabio, ĉar, difference de aliaj bestoj, ili estas longdaŭraj kaj sensimptomaj portantoj de la viruso. Por radikala neniigo de rabio necesas konstante malplialtigi la nombron de sovaĝaj fontoj de la infekto. Estis uzataj ankaŭ alimentaj logiloj kun kontraŭrabia vakcino por nutrado de vulpoj. Plej grave estas la ĉiujara vakcinado de ĉiuj hundoj. Sed la granda nombro de vagabondaj kaj senhejmaj hundoj malhelpas tiun celon en multaj loĝlokoj. Kaj certe tre gravas konstante klerigi homojn, ke necesas tuj post mordo tralavi la vundon per sapŝaumo kaj sin turni al medicinisto.

Antaŭ nelonge, ankaŭ aidoso estis ankoraŭ mortiga malsano. Sed nun, danke al efika kontraŭvirusa terapio, aidoso en multaj kazoj estas kronika, sed ne mortiga malsano. Se povus allogiĝi por lukto kun rabio sciencistoj, farmaciaj firmaoj, monrimedoj, almenaŭ iomete komparaj kun tiuj por aidoso, sukceso same estos evidenta.

Pli detalan informon pri sukcesa kuracado de la malsanulino de rabio oni povas akiri el Interreto kaj ankaŭ el la jenaj artikoloj:

1. R.E. Willoughby et al. *New England Journal of Medicine*, Vol.352, No.24, 2508-2514; June 16, 2005.

2. Rodney Willoughby. *Scientific American*; V mire nauki (En mondo de scienco), No.8, 40-47, 2007.

Vladimir LEMELEV

Korano en pinto de plejvenditaĵoj

En Nederlando jam de kelkaj jardekoj kreskas la procentaĵo de aŭtoroj, kies denaska lingvo estas ne la nederlanda. En la revuo *Fonto* siatempe mi artikolis pri la plej influaj el tiuj ĉi „novnederlandaj” literaturistoj. Unu el ili, Kader Abdolah (devena el Irano), post pluraj romanoj kaj novelaroj, aperigis dulibran skatolon: enestas *De Boodschapper* („La mesaĝisto”) apud nova traduko de la Korano. Laŭ lia opinio la okcidentaj kulturoj ne komprenos la sanktan libron de islamo, se oni ne lernas legi ĝin unuflanke lige al la vivo de Muhamado kaj aliflanke sen la

— laŭ li tro — granda pezo de la tradicia interpretado de l’ Korano. Tial, interalie, li prezentas la tekstojn de sia korana traduko en la origina sinsekvo de ties revelaciigo.

Ĉi tiu dulibra skatolo montriĝas grandega vendosukceso: en apenaŭ kvar semajnoj jam disvendiĝis pli ol 60 000 el la 75 000 ekzempleroj de la unua eldono. Dua eldono baldaŭ sekvos. Laŭ Kader Abdolah la multflankaj debatoj pri islamo en la nederlanda socio instigis lin verki ĉi tiun tradukon. Lia romano *Het huis van de moskee* („La domo de la moskeo”) el 2005 ricevis la duan lokon



RUTTY

post *De ontdekking van de hemel* („La malkovro de la ĉielo”) de Harry Mulisch kiel plej bona romano en la nederlanda lingvo.

Gerrit BERVELING

VATIKANO

Papo Pio la 12a – judsavanto

„Pio la 12a savis pli da judoj ol iu ajn en la mondo.” Tion solene asertis ĉe la mikrofonoj de la vatikana radio Gary Krupp, eminentulo de la usona hebrea komunumo kaj prezidanto de la fondaĵo *Pave the Way* (Pavimu la padon) en ju-

nio. Gary Krupp prezentis kune kun aliaj judoj, kiuj postvivis la amasmurdadon de la dua mondmilito, al la papo Benedikto la 16a en Vatikano la detalajn planojn por la simpozio, kiu disvolviĝos en septembro en Romo: evento aranĝita por memorigi la 50an datrevenon de la morto de Pio la 12a, kaj „por rekonfirmi la veron pri la agado de tiu papo en defendo de persekutataj judoj, kion oni obskurigis en amaskomunikila kampanjo lanĉita ekde la jaroj dek-sesaj, kiu ĉe ne malmulte da homoj estigis negativan impreson pri tiu papo”. Anoncis sian ĉeeston en la simpozio, interalie, diverslandaj judoj.

Dialogo kun islamanoj

En junio finiĝis la sesa interparolo de la papa konsilio por la interreligia dialo-

go de Vatikano kaj la centro por la interreligia dialogo de la organizaĵo por kulturo kaj islamaj rilatoj de Teherano. Ili kunsidis dum tri tagoj kaj unuanime agnoskis, interalie, ke „fido kaj racio estas ambaŭ fundamente kontraŭperfortaj”. Tiel oni respondis al la renkontiĝa temo: *Fido kaj racio en kristanismo kaj islamo*.

La dujara konsultiĝo ĉi-jare okazis en Romo. La venonta okazos en Teherano en 2010 kun temo fiksota de sep katolikaj kaj sep islamaj delegitoj. Post la ferma kunsido de la tritaga interparolo, la koncernaj spertuloj prezentis la altnivelajn esploraĵojn al la papo en privata aŭdienco.

Armando ZECCHIN



SHEFAET

Ekologia preĝejo

En la preĝejo de la litovaj martiroj en la urbeto Domeikava apud Kaunas dum sanktaj mesoj ne plu lumos elektraj lampoj. Elektro eklumos nur kelkfoje en la jaro dum sole-naj okazaĵoj kaj vintre. La pastro de la preĝejo Robertas Skrinskas klarigis, ke tiu ĉi preĝejo fariĝis la unua ekologia preĝejo en Litovio.

Tia decido estis farita lige al la monda malgrandiĝo de energiaj resursoj, ŝanĝiĝoj de la monda klimato, medi-poluo dum la produktado de energio ktp.

La pastro aldonis, ke la lumigiloj de la preĝejo ne serioze poluas la ĉirkaŭon, tamen gravas la ideo mem.

Laŭ aserto de la pastro, la paroĥanoj pleje estas pasivaj rilate la ekologian ideon, sed pli konsciencaj apogas. Li komparis: samkiel usonanoj iam aĉetadis grandegajn aŭtomobilojn por demonstri sian potencon, nun parte ankaŭ litovoj same kondutas. Liaopinie, tio estas nur vanteco.



LAST

Ekologia preĝejo en Domeikava apud Kaunas.

ISLAMO

Etna danino fariĝas proparolanto por islama kredantaro

La dana islama kredantaro elektis kiel novajn reprezentantojn s-ron Imran Shah kaj s-inon Bettina Meisner. Ili anstataŭos s-ron Kasem Said Ahmad, kiu ekŝiĝis de sia posteno, post kiam en pasinta marto li partoprenis manifestacion de *Hizb-ut-Tahrir* kontraŭ la reeldonado de la tiel nomataj „Muhamadaj desegnaĵoj”¹.

La 42-jara dana instruistino kaj patrino de kvar infanoj Bettina Meisner estonte respondecos pri la oficialaj kontaktoj kun la novaĵagentejoj. Siatempe, 18-jara, ŝi fariĝis islamano post multjara membreco en la pentekosta ekle-



Bettina Meisner

zio. En intervjuo al la dana gazeto *Information* komence de majo ŝi diris: „Mi opinias, ke per tiu ĉi decido ni dissendos gravan signalon al la socio, ke islamano kapablas avangarde agadi. Plia grava signalo estas mia dana deveno. Tio

emfazas, ke dana konvertiĝinto rajtas reprezenti la asocion.”

Betty CHATTERJEE

1. Noto de la redaktoro:

Hizb-ut-Tahrir (Partio de liberiĝo) estas internacia sunaisma politika organizaĵo, kiu celas unuigi ĉiujn islamajn landojn en unu islaman ŝtaton aŭ kalifujon, regotan de leĝosistemo bazita sur ŝario kaj gvidotan de elektata kalifo. La karikaturaj desegnaĵoj pri Muhamado en dana gazeto siatempe vekis grandan indignon ĉe islamanoj en la tuta mondo.

Nekutime leginda verko



Edwin de Kock rangas inter niaj plej konataj kaj talentaj poetoj. Ke li ankaŭ kapablas, tre leginde, verki proze, devus ne surprizi nin. En ĉi tiu libro li regalias nin ne nur per 51 poemoj (plejparte tre mallongaj) sur 64 paĝoj, sed ankaŭ per 192 paĝoj da prozo. Kaj en tiu prozo ni renkontas iom intime la homon, kiu strebas doni al nia poezio vere aŭtoktonan, same kiel ankaŭ aŭtentikan, karakteron priferindan.

Mi ne estas konata kiel poeto. (Kvankam Auld inkluzivis unu poemtradukon mian en sian *Nova esperanta krestomatio*, kaj mi doktoriĝis per tre profunda studo de la strukturaj principoj de la antikva hebrea poezio. Sed miaj recenzoj de la tradukoj de *Purgatorio* de Dante, kaj de *Faŭsto* de Goethe, ne renkontis entuziasman aklamon. Pli ĝuste: precize la malon.) Do mi ne riskos plu endanĝerigi mian literaturan reputacion per takso de la poemoj en ĉi libro; tion faru la disputantoj pri la poezio de de Kock.

Anstataŭe, mi ja aŭdacas diri, ke la komentoj de de Kock, en pluraj eseoj, pri la esperanta poezio, renkontas en mi entuziasmegan jeson. Li tondras pri la troamado al tradukoj de alilingva poezio; pri la timo (malpermeso, eĉ) forjeti la katenojn de la pseŭdolatingreka poeziarto, kiu iel sukcesis rangiĝi, kiel ortodoksa, en la esperanta literaturo; pri la rifuzo de niaj plej honoritaj poetoj akcepti indiĝene kreitan poetikon; pri la venko de centprocenta obeo al formreguloj, super enhavo, iniciatemo; pri la malakcepto de la unika eblo krei propran poezian artformon, venintan el la animo de la strukturo de nia lingvo mem – ĉion ĉi forte kondamnas de Kock, kaj, laŭ mi, li plene pravas. Kial ne kunprotestas aliaj literaturistoj sagacaj?

Ni ja sukcesis krei prozan literaturon, kvalite egalan al la proza literaturo de kiu ajn alia lingvo. Inter niaj romanistoj kaj novelistoj troviĝas kelkaj, kies genio kaj esprimkapablo egalas, argumenteble, eĉ kelkafoje superas, tiujn de la nacilingvaj verkistoj. Sed rilate al poezio, kiu nialingvulo kompareblas kun la kvalito de Homero, Ĥaŭcer, Ŝekspiro, Eliot ...? Traduko ne kapablas egale imponi kvalite kun la originalo. Tion laŭte (kaj, laŭ mi, nepridisputeble) krias de Kock. Ĉu ial ni missupozas, ke *imiti* alilingvan poezion estas ia honorinda ago?

En aliaj eseoj ni renkontas aliajn flankojn de de Kock. Ni legas pri la detaloj de la historio de la origina Stafeto (kiun de Kock nomas „la regula Stafeto”). Ni legas pri la problemoj suferataj, kiam oni transloĝiĝas el unu lando al alia lando, kie la lokaj kutimoj estas nefamiliaraj; pri religiaj problemoj de minoritatoj (de Kock konvertiĝis al la eklezio de Adventistoj de la Sepa Tago. Tio malfaciligas la vivon: oni ne volas akcepti, ke li rifuzas labori sabate).



Edwin de Kock

En kelkaj eseoj li rakontas pri tio, kiel lia veturemo kondukas lin al diversaj partoj de la mondo, kie li konatiĝas persone, kaj ne nur perletere, kun multaj tre bone konataj esperantistoj. Ankaŭ tiuj eseoj estas verkitaj per interesa, amikiga stilo. Entute, ĉi libro estas kelkasence aŭtobiografio.

Ĉiam klare verkita, lingvaĵo apenaŭ riproĉebla. Lian apologion pri la tiel nomataj neologismoj mi rekomendas; li vere pravas.

Naskite en 1930, de Kock retrorigardas sian vivon, siajn decidojn sukcesajn kaj fiaskajn, malkaŝe kaj honeste. Ni vidas veran homon, ne publikan maskon, kaj per tio la libro ne nur nin informas, sed ankaŭ kaptas nian simpatian. Lian preton malkaŝe diri siajn opiniojn mi admiras.

Sub fremdaj ĉieloj estas volumo 32 en la serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj meritas tiun distingon. Gratulojn al FEL kaj al Edwin de Kock.

Donald BROADRIBB

Edwin de Kock: *Sub fremdaj ĉieloj*. Eld. FEL, Antverpeno, 2007. 288 paĝoj kudritaj. ISBN 978 90 77066 33 1.

Prezo ĉe FEL: 22,49 eŭroj + afranko

Mezepokaj sekret(igit)aj sonetoj

Mi konscias, ke la komparo estas nenatura, malkongrua, eble eĉ blasfema: sed ĉi tiu verko aspektas al mi simila al la *Sekretaj sonetoj* de Kalocsay. La tempa distanco ne povus esti pli granda: dum Kalocsay verkas en la freŝe finiĝinta jarcento (sed li ja parolas pri eterna temo), la nuna libreto venas fantome el la mezepoko. Ĉu ĝi estas de Dante Alighieri, la aŭtoro de la *Dia Komedio*, estas interesa propono, subtenata de kelkaj aŭtoritatecaj italaj kritikistoj, sed sen certeco (diskuto pri tiu atribuo troviĝas en la *Prezento*). La retrovo de la manuskripto aspektas magia: ŝajne, ekzistas unu sola kodekso, trovita kaj eldonita en Montpellier en 1881 fare de Ferdinand Castets. Li nomis ĝin *La floro*, kaj tiel ĝi estas nun konata; la aŭtoro mem nomas sin *Durante*.

Temas pri krono de 232 sonetoj, paŭsantaj tre faman kanvason, la *Roman de la Rose*, kiu estas franca korteza poemo el preskaŭ 18.000 versoj, verkita en du partoj de du malsamaj poetoj, je preskaŭ duonjarcenta distanco en la pleno de la dek-tria jarcento. La *Roman de la Rose* furoris en Francio dum pli ol du jarcentoj kaj vastan resonon ĝi havis ankaŭ en Italio. Ĉi elementoj tute bone pravigas la ekziston de mezepoka traduko, mallongigo kaj adapto en la toskana dialekto, kvankam abunde akceptanta francismojn kaj okcitanismojn; absolute surprizas tamen, ke neniu mencio aŭ aludo pri tia adapto aperas entute dum kvin jarcentoj da literaturhistorio, ĝis la abrupta retrovo en 1881.

La redukto de la originala franca poemo estas interesa: malaperas ampleksa parto, spegulanta la feŭdan socion, ne plu aktuala en poemo, direktata al la burĝa socio, krejanta en Florenco; malaperas entute la didaktika kaj la korteza parto; la korteza amo transformiĝas

al amoro; la rolantoj estas la samaj, sed restas pri ili nur la nomo, la personeco ŝanĝiĝas.

La intrigo, post la redukto, fariĝas tute simpla, eĉ banala: Amanto volas konkeri Belulinon, kun ne tro kaŝita aludo, ke la celo de la konkero estas ne ja ŝia personeco kaj amo, sed ŝia seksa organo, la *floro*. Pudoro, Timo kaj Historio, aliaj rolantoj, opozicias. Same opozicias Misbuŝo, rolo reprezentanta la sociajn konvenciojn, la klaĉojn. Ĵaluzo kaj Ĉasteco enfermas Belulinon en kastelon, sed Amoro venas helpe al Amanto kaj per plia helpo de Venuso bruligas la kastelon. Ĉar ne temas pri krimromano, ne estu malpermesite rakonti la epilogon, cetere facile diveneblan: Amanto sukcesas konkeri la floron de Belulino kaj ĉi tiu lasta ago estas precize, kvankam per tre poeziaj vortoj, priskribita.

Meze de la sinsekvo de la eventoj aperas iuj didaktikaj partoj, restaĵoj de la origina franca fonto, kun bizaraj rolantoj: Amiko parolas pri vira oportunismo, Oldulino simetrie pri la virina, Falsaspekto predikas pri hipokriteco.

El la peza franca originalo fariĝas do poemo pli burleska ol filozofia, pli rakonta ol didaktika. Eble heroldas revenĝon de la virino ĉi tiu iom miriga soneto kun la konsiloj de Oldulino:

*Se l'viro duan amatinon havas,
kaj diras por pli akre ŝin dolori
ke li la duan havas por amori
kaj ke per sia amo li ŝin ravas,*

*al la virino la afer'ne gravas;
ŝi en ekster' ŝajnigas tre angori,
sed en la koro pluas bonhumori,
kvankam la viro pri l'altra pavas.*

*Ŝi tamen al li diras senprokraste,
ke duran venĝon faros ja ŝi mem*

kaj tiu amatino pagos draste,

*sed poste lin forlasos sen problem',
per nova viro sin provizos haste,
lasante lin en tristo kaj korprem'.*

Aŭ jen alia konsilo:

*Se vi invitis en la sama horo
du virojn pro eraro senkonscia,
kaj unu kuŝas jam en lito via
dum dua venas ...*

... nu ĉi tiun konsilon mi ne malkaŝos; indas legi ĝin mem!

Traduki pli ol 200 sonetojn, do kun strikta rimoskemo estas defio, kiun Enrico Dondi plensukcese venkis; li redonis kaj la stilon kaj la humuron en lingvo klara kaj flua, tiel ke la libro legiĝas tute senstreĉe kun granda plezuro, kio ne ofte okazas ĉe versaĵoj. Dondi estas ja majstro de la dek-kvara itala jarcento: lia estas la traduko en tercinoj de la tuta *Dia Komedio* kaj la traduko de la *Vivo nova* de Dante, aperintaj post 2000 ĉe eldonejo *Fonto*. Liajn tradukojn ni konas jam de la *Itala Antologio*, aperinta en 1987, sed konceptita multe pli frue; ni konas lian helpon en la revizio de la traduko de la *Dia Komedio* de Giovanni Peterlongo (1963); li do firmiĝis kiel la plej ampleksa tradukinto el la itala poezio. Li, 73-jara kuracisto, preferas verki ol movadumi; specimeneto el lia originala poezio troviĝas en la dua eldono de la *Esperanta Antologio*, sed originalaĵojn li flegis nur dum tre mallonga tempo. Tre ĝojinde, ke li denove regalis nin per elstara traduka verko.

Carlo MINNAJA

Durante (?) Dante: *La Floro*. Tr. E. Dondi. Eld. Fonto, Chapecó, 2007. 244 paĝoj broŝuritaj

Punkto de malekvilibriĝo

Dum vizito al kuzo mia, kiu loĝas en najbara lando, kaptis mian atenton libro en la angla lingvo kun la titolo *Tipping Point*. Ĉar la aŭtoro uzas ĉi tiun esprimon en iom malkutima senco, ĝi ne estas facile tradukebla, sed mi proponas la tradukon „Punkto de malekvilibriĝo”. Poste mi provos klarigi, kion la verkisto celas.

La aŭtoro, Malcolm Gladwell [malkam gladŭel], estas ano de la redaktora stabo de la usona ĵurnalo *New Yorker*. Pli frue, li estis rubrikredaktoro pri komerco, scienco kaj medicino ĉe la ĵurnalo *Washington Post*.

Ne tre plaĉis al mi la stilo aŭ ĝenerala enhavo de la verko, en kiu Gladwell tamen prezentas almenaŭ tri konceptojn, kiuj ŝajnas al mi aparte interesaj kaj gravaj. Jen ili:

1. Ideoj, tendencoj, kaj socia konduko similas al virusoj. Ili disvastiĝas tra la socio kiel epidemio de kontaĝa morbo.


2. Socia situacio povas dum longa tempo resti stabila kaj neŝanĝita, sed subite simpla ago de unuopulo, aŭ de malgranda nombro da unuopuloj, aŭ enkonduko de unuopa nova faktoro sufiĉas por malekvilibriĝi kaj transformi ĝin.

3. La ideala amplekso de bone funkcia homa grupo estas ne pli ol 150 personoj.

Ne surprizas, do, la subtitolo de la libro: *How little things can make a big difference* („Kiel aĵoj etaj kreas diferencon egan”).

Ŝuoj

En sia enkonduko, Gladwell donas frapan ekzemplon. Temas pri la usona ŝumarko *Hush Puppies* (laŭvorte „silentaj hundidoj”). Tiuj ŝuoj estas faritaj el broŝita svedledo kaj havas malpezajn spongokaŭĉukajn plandojn. Tial ili pli komfortas, ol elegantas. Sed ĉirkaŭ la fino de 1994 la entrepreno, kiu fabrikis



HTTP://PORTABLECONTENT.FILES.WORDPRESS.COM

la ŝuojn, troviĝis en stagna situacio.

La fabrikantoj demandis sin, ĉu ili ĉesu produkti la markon kaj enkonduki tute novan stilon. Sed tiam okazis io eksterordinara. Subite, en la kluboj kaj trinkejoj de la kvartalo Soho en Novjorko, la marko Hush Puppies ekfuroris en hipiaj rondoj. Post fulme mallonga tempo ŝajnis, ke preskaŭ tuta Novjorko volis porti tiujn ŝuojn. Du jarojn poste la ŝuoj aĉetebles en ĉiuj butikumejoj en Usono.

Gladwell donas multajn aliajn ekzemplojn de tiaj *epidemioj* estigitaj de malgrandaj faktoroj, grupetoj aŭ unuopuloj: disvastiĝo de sifiliso en la urbo Baltimoro; populareco de iu televidprogramo por etinfanoj; epidemio de memmortigo pro imito inter junaj viroj en Mikronezio, ktp.

Biologo

Sed kio pri la teorio, ke 150 estas la maksimuma nombro da personoj por konsistigi ideale funkcia socia grupo? Gladwell citas jenan eltiraĵon el skribaĵo de la evoluisma biologo S. L. Washburn [ŭoŝbern]: „La plej granda parto de la homa evoluo okazis antaŭ la estiĝo de la agrikulturo, kiam la homoj



Ideoj, tendencoj, kaj socia konduko similas al virusoj. Ili disvastiĝas tra la socio kiel epidemio de kontaĝa morbo.

vivadis en malgrandaj grupoj en vizaĝ'-al-vizaĝa proksimo. Sekve, la homa biologio evoluis kiel adapta meĥanismo al kondiĉoj, kiuj grandparte ne plu ekzistas. La homo evoluis por havi fortajn sentojn rilate al malmulte da personoj, mallongaj distancoj, kaj relative mallongaj tempoperiodoj; kaj tiuj estas ankoraŭ la vivdimensioj, kiuj por li estas gravaj.”

La brita antropologo Robin Dunbar studis la antropologian literaturon, kaj konstatis, ke en ĝi daŭre aperas la nombro 150. Ekzemple, li konsideris 21 malsamajn sociojn de ĉasistoj-kolektistoj, pri kiuj ekzistas fidinda historia atestaĵo: de la Walbiri-popolo [ŭalbiri] de Aŭstralio ĝis la Tauadeanoj de Novgvineo, kaj de la Amasalik-popolo de Groenlando ĝis la Ona-popolo de Fuego.

Taĉmentoj

Dunbar konstatis, ke la mezuma nombro de homoj en iliaj vilaĝoj estis 148,4. Simila cifero konstateblas ĉe militaj organizaĵoj. Dunbar asertas, ke ĝenerale efike funkciantaj batalaĉmentoj ne po-

vas esti multe pli grandaj ol 200 viroj. Membroj de la huteranaj religiaj komunumoj en Usono trovis, ke la plej bona kaj efika maniero administri homan grupon estas ĝin limigi al iom malpli ol 150 personoj.

Se estas pli ol tiu cifero, asertas iu huterano: „La homoj iĝas fremdujoj unu al la alia.” Do, kiam la grupo proksimiĝas al tiu nombro, la komunumo disdividiĝas, kaj formas novan grupon. La eltrovaĵo de Dunbar povas esti instrua por ĉiuj homaj organizaĵoj.

Mondomilito

Kiel plia ekzemplo de la „virusa” disvastigo de ideoj eblas citi la kazon de la lingvo, en kiu estas redaktata ĉi tiu magazino. Dum la „franca” periodo de la lingvo, en la komencaj jaroj de la 20a jarcento, Esperanto – kreaĵo de unu sola homo, laborante sola – disvastiĝis kiel epidemio. Ne longe poste, ĝi suferis du gravajn frapojn, kiuj bremsis tiun disvastigon: nome la Ido-krizon kaj la unuan mondomiliton. En la periodo in-

ter la du mondomilitoj, ĝi refoje komencis kreski, ĝis la dua mondomilito, kiu refoje malhelpis ĝian kreskadon. Dum la ĥaosa situacio, kiu sekvis la disfalon de sovetia komunismo kaj de Sovetio, Esperanto denove suferis. Estis periodo de relativa stagnado aŭ eĉ malkresko en landoj, kie ĝi dumtempe floris.

Nun tamen ŝajnas, ke nova faktoro eble perturbos la ekvilibron de tiu stagna periodo, nome Interreto. Iam iu unuopa esperantisto aŭ kelkaj esperantistoj kune havis la ideon ne nur uzi Esperanton kiel retpoŝtan komunikilon sed ankaŭ krei retpaĝojn en kaj pri Esperanto. Hodiaŭ la nombro de tiaj paĝoj, inkluzivantaj ligojn al lerniloj kaj lecionoj, multiĝas kiel benignaj virusoj. Ne plu estas laŭmode paroli pri „la fina venko”, sed eble ne estas tro optimisme paroli pri nova ŝanco por Esperanto danke al ĝia apero en Interreto kaj en la Tut-Tera Teksaĵo. Aŭ eble estiĝos nova malekvilibra punkto, kiu igos la homojn konscii pri bezono de internacia lingvo.

Garvan MAKAJ
Irlando



La ideala amplekso de bone funkcianta homa grupo estas ne pli ol 150 personoj.

Silentiga kaj spirhaltiga spektaklo

Ĵus vidinte la filmon *Ben X*, oni iĝas silenta. Oni silentas, ĉar oni pripensas la temaron de la rakonto kaj oni silentas, ĉar oni ankoraŭ devas digesti ĝin: kio nun vere okazis? La kulmino de la filmo aperas nur en la lastaj minutoj, antaŭkonstruata ade kaj ade tra la tuta historio. La rakonto, bazita sur vera historio, temas pri la junulo Ben, kiu estas modere aŭtisma. Por povi eskapi el la realeco kaj precipe por povi toleri la daŭran ĉikanadon kaj turmentadon de siaj kunlernantoj en teknika lernejo,

li kaŝas sin en sia persona mondo de komputilaj ludoj, en kiu li iĝas vera majstro. Li atingas eĉ nivelon 80! Sed kiam amikino lia, kiun li „renkontis” en Interreto, havas kontakton kun li en la reala mondo, Ben devas iom ŝanĝi sian vivon. Pli pri la enhavo ne eblas diri, ĉar tio ruinigus ĉion. Oni devas „submetiĝi” al la filmo.

Ben X estas la unua longluda filmo de Nic Balthazar, iama filmkritikisto kaj multjara prezentisto kaj produktanto de VRT, *Vlaamse Radio en Televisieomroep*,

la flandra radio kaj televido. La temo de *Ben X* iasence ne estas nova. La filmo estas bazita sur furorlibro de Balthazar *Niets is alles wat hij zei* (Li diris nenion krom nenio), kiu poste estis siavice uzata kiel bazo de la teatraĵo *Nienio* (Nenio). Nenio nova do? Tamen!

Por povi igi viva al la spektantoj la mondon de Ben, la produktanto ne hezitis miksi en la ĉefan rakonton scenojn el komputila ludo, ĉi-okaze la ludo *Archlord* de *Codemasters*. „Ni venigis ses ludantojn de la ludo al mia oficejo, petis ilin ludi laŭ miaj instrukcioj kaj uzi mian scenaron, kaj poste ni petis al la teknikistoj de *Codemasters* registri la ludadon sur disko”, klarigas Nic Balthazar. Ĉio tio estis miksitita kun realaj scenoj, kaj liveras spirhaltigan spektaklon.

Ben X pli-malpli nun aperas en ĉiuj kinejoj. Tamen ĝi jam aĝas unu jaron. En la filmfestivalo de Montrealo de 2007 Nic Balthazar sukcesis arigi tri premiojn, nome la trofeon *Granda Premio de la Amerikoj*, la premion pri la plej populara filmo kaj la premion de la eŭkumena ĵurio. En la *Sedona International Film Festival* de 2008 *Ben X* ricevis la mencion „plej bona eksterlanda filmo”.

Estas nekredeble, kiel ies unua filmo tiel proksimiĝas al perfekteco. Kaptu la okazon por spekti ĝin, se ĝi aperas en via regiono. La filmo ankaŭ jam aperis kiel aĉetebla viddisko.

Vidu ankaŭ la retejon de la filmo: www.benx.be

Paŭl PEERAERTS



La du junaj ĉefaktoroj estas Greg Timmermans (*Ben*) kaj Laura Verlinden (*Scarlite*, la amikino de Ben).

anoncetoj

Vizitu IperNity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

INTER

Projekto de poŝtkartarto

por la 4-a volumo de nia jara libro
"KIOSKO DE LEVANTO – libera, skeptika, interkultura"

Temo: La vorto "inter",
siaj memstaraj formoj & kunmetaĵoj.
Formo: Teksto, desegnaĵo, grafikaĵo,
foto ktp. & kombinaĵoj el tiuj.
Formato: Ordinara poŝtkarto
(DIN 6, 105 x 148 mm),
unu aŭ ambaŭflanke prilaborita
Lingvoj: Ĉefe Esperanto, ĉe aliaj lingvoj laŭeble
kun taŭga traduko-klarigo.
Koloroj: Nur nigra-blanka, laŭeble altkontrasta.
Nombro: Maksimume 4 poŝtkartoj ĉiuaŭtore.
Sendomaniero: Nur „normal“-poŝta, ne elektronika.
Limdato: 2009-septembro-30

Ĉiuj estas amike invitataj!

Adreso de alsendo:

NULA HORO

AP 270 – C/Esperanto, 3

03170 Rojas (Alicante)

Hispanio

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel
Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet,
Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier,
Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn,
Gennadij Turkov, Fra Gaeta,
Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata
revuo por lernemaj, verkemaj,
iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj,
praktikaj rezultoj, belaj bildoj,
spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.Komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



enciklopedieto kun
informoj kiel telefoni
el kaj al eksterlando

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2009

via poŝamiko dum la tuta jaro 2009



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezoj en p.4)

certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)